



Ivana Brlić-Mažuranić
(1874-1938)

Ivana Brlić-Mažuranić estas la klasikulo de la kroata porinfana literaturo. Ŝi estis la unua virino el Kroatio proponita por la Nobelpremio pri literaturo.

En la jaro 1998, ses jardekojn post ŝia morto, Kroata Esperanto-Ligo proponas ŝian plej faman libron al la internacia publiko. La eventuroj de la metilernanto Hlapiĉ aperis en la jaro 1913. Post tiu tempo la metilernanto Hlapiĉ al multaj generacioj de homoj "etaĵ kaj barbohavaĵ" montris, ke estas nur du manieroj vivteni sin: laboro kaj honesto.

Kun la internacia publiko kiu legas en Esperanto ni ŝatus dividi la fantazion de "la kroata Andersen" kaj ŝiajn metaforojn, ĉerpitaj el la fundo de la kroata lingvo.

La inspira traduko de Maja Tišljar helpu al vi kompreni kial la metilernanto Hlapiĉ konservis sian ĉarmon tra jardekoj.

ISBN 953-96918-2-6

Ivana Brlić-Mažuranić: MIRINDAJ AVENTUROJ DE METILERNANTO HLAPIĈ



Ivana Brlić-Mažuranić

MIRINDAJ AVENTUROJ
DE METILERNANTO HLAPIĈ

Redaktoro
SPOMENKA ŠTIMEC

Tradukis
MAJA TIŠLJAR

Titolpaĝa ilustraĵo
IVICA ANTOLČIĆ

ISBN 953-96918-2-6

CIP - Katalogizacija u publikaciji
Nacionalna i sveučilišna knjižnica, Zagreb
UDK 886.2(02.053.2)-32=800.892
BRLIĆ-Mažuranić, Ivana
Mirindaj aventuroj de metilernanto
Hlapiĉ / Ivana Brlić Mažuranić
[tradukis Maja Tišljjar]. - Zagreb :
Kroata Esperanto-Ligo, 1998. - 112 str. ; 20 cm
Prijevod djela: Čudnovate zgode šegrta Hlapića

ISBN 953-96918-2-6

980515015

Kompostis
Libro TIM
Presis
Tisak MORE

Ivana Brlić - Mažuranić

MIRINDAJ AVENTUROJ DE METILERNANTO HLAPIĈ



Kroata Esperanto-Ligo
Zagreb, 1998

AL ETAJ LEGANTOJ

Tio ĉi estas rakonto pri stranga vojaĝo de servisto Hlapiĉ. Hlapiĉ estis eta kiel abelo, ĝoja kiel birdo, kuraĝa kiel la reĝido Marko, saĝa kiel libro kaj bona kiel suno. Kaj ĉar li estis tia, li bonŝance elsaviĝis el multaj danĝeroj.

Vojaĝo de Hlapiĉ unue estis simpla kiel infanludo kaj la legantoj komence de tiu ĉi libro demandas: "Kial Hlapiĉ bezonus tiom da saĝo kaj tiom da kuraĝo por tiel simpla vojaĝo? Ĉu li bezonas tiom da kuraĝo por perbride konduki jungitan azenon? Aŭ, ĉu li bezonas sian saĝecon por serĉi perditajn anserojn?"

Sed poste la vojaĝo de Hlapiĉ iĝis ĉiam pli komplika kaj pli danĝera kiel ja kutime okazas. Kaj kiam la legantoj ekvidos Hlapiĉ en granda danĝero kaj grandaj implikaĵoj, ili diros: "Vere bone faris Hlapiĉ kunportinte por esti sekura multe da boneco, saĝo kaj kuraĝo, kiam li frumatene startis al la malproksima mondo."

Kaj ĝuste tial okazis fine kiel estis plej bone.

Sed tial tamen neniu forkuru de sia hejmo. Ja neniu tiom suferis kiom Hlapiĉ ĉe majstro Mrkonja kaj dio scias ĉu ĉiu estus tiom bonŝanca dum sia vojaĝo kiel estis Hlapiĉ. Vi miros ankaŭ, ke fine ĉio bone finiĝis.

Sidiĝu do sursojle kaj legu!

Jvanabrlj' Sakurani'

ĈE MAJSTRO MRKONJA

METILERNANTO HLAPIĈ

Estis iu eta ŝufarista metilernanto, kiu havis nek patron nek patrinon. Li nomiĝis Hlapiĉ.

Hlapiĉ estis ankoraŭ eta kaj ĝoja kiel birdo. Tuttage li sidis en disŝirita pantalonon kaj ruĝa ĉemizo sur malgranda, ŝufarista seĝo, kiu havis tri krurojn kaj dum la tuta tago li enbatis ligno - najlojn en botojn kaj kudris ŝuojn. Tuttage li kantadis kaj fajfadis laborante.

Mastro de Hlapiĉ nomiĝis Mrkonja kaj li estis malbona kaj timiga. Tiom granda li estis, ke lia kapo atingis plafonon en ilia malgranda ĉambro. Li havis hirtajn harojn kiel leono kaj lipharojn longajn ĝis la ŝultroj. Lia voĉo estis tiom forta laŭ granda kiel ĉe urso.

Majstro Mrkonja havis foje dum la vivo ege malgajan travivaĵon kaj de tiam li estis tre malbonkora. Kia malfeliĉo trafis la majstron Mrkonja evidentiĝos multe pli poste en tiu ĉi libro. Majstro Mrkonja estis do malbonkora kaj tre maljusta kaj li insultis kaj kriis al Hlapiĉ, kiam ajn li estis malbonhumora.

La majstrino estis tre bona. Ankaŭ ŝin trafis la sama malĝojiga okazaĵo kiel la majstron Mrkonja. Sed ŝi de tiam iĝis ankoraŭ pli bona kaj ŝi havis tre bonan koron. Ŝi tre ŝatis Hlapiĉ.

Sed ankaŭ ŝi timis majstron Mrkonja. Kiam ajn ŝi portis al Hlapiĉ freŝan panon, ŝi ĉiam kaŝis ĝin sub sian antaŭtukon, ke la majstro ne vidu, ĉar li estis ordoninta, ke al Hlapiĉ oni donu malmolan kaj malnovan panon sed la majstrino sciis, ke Hlapiĉ

volonte manĝas molan paneton.

Hlapiĉ havis nur unu disŝiritan pantalonon kaj unu plian, kiun la majstrino kudris por li el verda tolaĵo. Tiu tolaĵo restis de verda antaŭtuko de la majstro kaj li ordonis al sia edzino, ke ŝi faru el ĝi pantalonon por Hlapiĉ. Hlapiĉ havis en tiu pantalonon krurojn verdajn kiel rano kaj pro tio li ne volonte surmetis ĝin, ĉar aliaj metilernantoj primokis lin. Majstro Mrkonja ordonis, ke li devas surmeti la pantalonon dimanĉe. Hlapiĉ estis ĉiam bonhumora kaj kiam li komprenis, ke li devas porti tiun pantalonon, li ankaŭ mem ekŝercis. Li kvakadis "kre-cre" kiel rano kiam ajn li surmetis la pantalonon.

Kiam aliaj metilernantoj vidis, ke Hlapiĉ ŝercas, ili ne plu primokis lin, sed anstataŭe ili ludis kun li dimanĉe kaj ili tre ŝatis lin. Majstro Mrkonja ne rajtis vidi, ke Hlapiĉ, ludas ĉar li tuj pelus lin hejmen.

Tiel vivis Hlapiĉ ĉe majstro Mrkonja kaj li ne fartis bone. Sed li tamen estus verŝajne longe restinta tie, se ne estus okazinta io, kio lin ege malĝojigis.

BOTETOJ

Iu riĉa sinjoro mendis de majstro Mrkonja botetojn por sia eta filo.

La botetoj estis tre belaj. Iliaj flankledoĵoj brilis kiel suno. Hlapiĉ mem enbatis la lignonajlojn en la botojn. Sed kiam la sinjoro venis kun sia filo preni la botojn kaj la filo surmetis ilin, la botoj malbonŝance estis tro malgrandaj. Pro tio la sinjoro nek volis preni nek pagi la botojn kaj majstro Mrkonja kverelis kun li. La sinjoro malgraŭ tio ne volis preni kaj pagi la botojn.

Kiam la sinjoro foriris, majstro Mrkonja ekfuriozis kaj kriis kontraŭ Hlapiĉ:

"Vi, malbonulo, kulpas! Vi maldiligentulo! Vi sentaŭgulo! Vi kulpas, ke la botoj estas tro malgrandaj!" Terure kriis Mrkonja. Tiam li kaptis la botetojn kaj batis per ili la dorson de Hlapiĉ. Tio estis tro maljusta, ĉar la majstro mem tajlis la botojn kaj do Hlapiĉ ne kulpis, ke ili estis tro malgrandaj. Sed kiam majstro Mrkonja koleris, li ne sciis kio estas ĝusta kaj kio malĝusta.

Li do batis Hlapiĉ sur la dorso, ĵetis la botojn en angulon kaj diris al sia edzino: "Morgaŭ vi ĵetos ilin en la fajron. Mi ne plu volas vidi tiujn botojn." Tiam li turniĝis kiel leono al Hlapiĉ kaj timigis lin perpugne kaj per sia tondra voĉo: "La botoj forbrulos, sed vi, maldiligentulo, ankoraŭ pagos pro tio." Tio signifis ke, Hlapiĉ ankoraŭ estos batita pro la botoj.

Kiam Hlapiĉ vespere iris dormi, li nek fajfis nek kantis kiel kutime, sed li pri io pensis.

Hlapiĉ dormis en la kuirejo, surplanke, apud kuirforno. Tie li havis malmolan pajlomatracon, disŝiritan kovrilon kaj kandelpoceton enpikitan en terpomon, ĉar li ne havis kandelington.

Kuŝiĝis do Hlapiĉ sur sian pajlomatracon, estingis la kandelon kiu ankoraŭ iom elrigardis el la terpomo kaj ekpensis. Pensis Hlapiĉ kaj pensis kaj tiam li decidis dumnokte forkuri de majstro Mrkonja kaj foriri en la malproksiman mondon. Kvankam tio ne estis facila kaj ankaŭ estis danĝera, tamen Hlapiĉ faris ĝin. Kion ja servisto povas imagi, tion li povas ankaŭ realigi.

FUGO

Dum la nokto, kiam ĉiuj profunde dormis, Hlapiĉ ekstaris. Ĉirkaŭ li ĉio estis malhela kiel en fermita skatolo. Kiam Hlapiĉ bruligis alumeton, sur la planko aŭdiĝis susuroj, kraketoj kaj iuj bestetoj diskuris al ĉiuj direktoj. Tio estis musoj, kiuj dumnokte mordetis ledon. Sed Hlapiĉ ne reagis al ili, ĉar li havis ankoraŭ multon por fari por prepari sian vojaĝon.

Unue Hlapiĉ prenis pecon da malnova papero kaj grandan ŝufaristan krajonon. Tiam li sidiĝis sur sian etan, trikruran seĝon kaj ekskribis leteron:

Vi volis ĵeti la botetojn en fajron. Mi tion bedaŭras kaj mi foriras en la mondon por piedpremi ilin. Tiam ili ne plu estos tro malgrandaj. Estu pli bona kun via sekva servisto. Donu al li pli da supo kaj pli molan panon. La botojn mi redonos al vi.

Hlapiĉ

Tion Hlapiĉ tre longe skribis, ĉar li ne tre bone kapablis skribi. Liaj literoj estis grandaj kaj malrektaj kiel piroj.

Kiam Hlapiĉ finis tiun leteron, li ekstaris tre silente kaj fiksis la leteron al la majstra antaŭtuko, kiu pendis surmure. Tiam li sidiĝis kaj ekskribis la duan leteron:

Kara sinjorino!

Dankon por via boneco. Mi iras en la mondon. Mi pensos pri vi kaj mi helpos al ĉiuj kiel vi helpis min.

via Hlapiĉ

Tiam li denove ekstaris kaj fiksitis la leteron al la antaŭtuko majstrina. La antaŭtuko de la majstrino ankaŭ pendis surmure. Tiam prenis Hlapiĉ sian ruĝan ledskatolon kaj ekpakis en ĝin ĉion, kion li bezonis por la vojaĝo. Unue li enmetis pecon da pano kaj pecon da lardo. Tio estis lia vespermanĝo de hieraŭ, ĉar li hieraŭ estis malgaja kaj ne povis vespermanĝi.

En la sakon li enmetis bluan tukon, unu alenon, iom da ŝnuraĵoj kaj kelkajn ledpecetojn. Hlapiĉ nome estis vera eta ŝufaristo kaj ŝufaristo ne povas estadi sen aleno kaj ŝnuraĵo kiel soldato ne povas sen fusilo. Tiam li enmetis en la sakon sian etan tranĉilon kaj la sako estis plena.

Kiam tio estis preta, Hlapiĉ vestiĝis por la vojaĝo.

Unue li prenis de la najlo sian verdan pantalonon kaj vestis ĝin. Preskaŭ li ekkvakis surmetante ĝin, tiom li kutimiĝis al tiu ĉi ŝerco! Sed li devis silenti kiel muso, ke ne vekiĝu majstro Mrkonja, kiu dormis en la apuda ĉambro.

Poste Hlapiĉ prenis fadenon kaj riparitis kubuton sur sia ruĝa ĉemizo kaj li vestis ĝin. El la angulo li prenis ankaŭ tiujn belegajn botetojn, pro kiuj li hieraŭ estis batita.

Hlapiĉ preskaŭ ekfajfis pro ĝojo, tiom belaj ili aspektis! Sed kompreneble li ankaŭ fajfi ne rajtis, ĉar la majstro vekiĝus! Tiam Hlapiĉ volis preni sian ĉapon, sed ĝi estis tute disŝirita kaj malpura. Tial Hlapiĉ prenis pecon da brila ledo, kiu restis de la botoj kaj kudris larĝan rubandon ĉirkaŭ la ĉapo. Facile estis por li kudri ledon estinte ŝufaristo!

La ĉapo nun brilis kiel suno kaj Hlapiĉ metis ĝin sur la kapon. Tiel Hlapiĉ estis preta por la vojaĝo. Li surhavis verdan pantalonon, ruĝan ĉemizon, belegajn botetojn, brilan ĉapon kaj ruĝan sakon transŝultre.

Li aspektis kiel generalo en iu stranga armeo! Tiam Hlapiĉ

ŝtelforiris mallaŭte, tute mallaŭte el la laborejo en la korton.

En la korto estis ligita hundo Bundaŝ. Hlapiĉ kaj Bundaŝ estis grandaj amikoj, tial Hlapiĉ ne iris nun al li, ĉar li sciis, ke Bundaŝ ĝemos pro li. Kaj por Hlapiĉ ĉiukaze estis malfacile kaj li ege bedaŭris, ke li devis forlasi Bundaŝ.

Ĝuste kiam Hlapiĉ eliris sur la korton, ektusis majstro Mrkonja enĉambre. La majstro nur dormante tuis. Lia gorĝo raŭkis, ĉar li hieraŭ ege kriis je Hlapiĉ. Kiam Hlapiĉ aŭdis, ke la majstro tudas, li fartis terure. Li timiĝis pensante, ke majstro Mrkonja vekiĝis: "Fuĝu nun, Hlapiĉ, plej eble rapide", li diris al si mem.

Li rapide traŝoviĝis eksteren tra la granda pordo de la domo, kiu bonŝance ne estis ŝlosita kaj li troviĝis surstrate. Sur la strato estis ankoraŭ nigra mallumo. Domoj aspektis grandaj ĝis la ĉielo kaj Hlapiĉ marŝis tre rapide. Nenie troviĝis iu ajn; ĉiuj homoj estis ankoraŭ dormantaj. Tiel fuĝis Hlapiĉ for de majstro Mrkonja.

LA UNUA VOJAĜTAGO

ETA LAKTISTO

Iris Hlapiĉ kaj iris longe sur stratoj, ĉar la urbo estis granda. Li jam trapasis tiom da stratoj, ke majstro Mrkonja ne plu povus trovi lin.

Hlapiĉ daŭre iris kaj tiam ekkrepuskis, kaj ne plu estis tiom mallume. En la lasta strato de la urbo Hlapiĉ renkontis iun maljunulon, kiu sur malgranda ĉaro kaj per malgranda azeno veturigis multajn ujojn kun lakto en la urbon. La ĉaro kaj la azeno estis tre belaj, sed la povra maljunulo estis malforta kaj klinita.

La maljunulo kun la ĉaro haltis antaŭ trietaĝa domo, kiu estis tiom alta, ke ĝiajn plej suprajn fenestrojn ankoraŭ rigardis la luno.

Kiam la maljunulo kun la azeno haltis antaŭ la domo, li prenis laktujon kaj volis porti ĝin en la domon. Sed ĉar li estis malforta, li stumblis ĉe la unua ŝtupo kaj preskaŭ falis. Li ekĝemis kaj sidiĝis sur la ŝtupon antaŭ la domo.

En tiu momento venis Hlapiĉ en la verda pantalono kaj ruĝa ĉemizo, kun belegaj botetoj kaj brilanta ĉapo. Kiam la maljunulo vidis lin, li tiom ekmiris, ke li ĉesis ĝemi.

"Venu, avo, mi helpas al vi porti la lakton en la domon", diris Hlapiĉ.

"Kaj de kie vi venas?" demandis la avo strangan junuleton. Hlapiĉ ne ŝatis rakonti pri majstro Mrkonja kaj tial li diris: "Mi estas servisto Hlapiĉ. Sendis min la imperiestro, ke mi uzmligu la botojn de lia filo kaj ke mi helpu, se iu en la imperio bezonas helpon."

La maljunulo sciis ke Hlapiĉ ŝercas sed Hlapiĉ tiom plaĉis al li, ke la maljunulo ĉesis ĝemi, li eĉ ekridis.

"Al kiu etaĝo mi devas porti la lakton?" demandis Hlapiĉ.

"Al la tria", diris la maljunulo.

Hlapiĉ estis tre forta, li kaptis la ujon kaj forportis ĝin en la domon kvazaŭ ĝi estus plummalpeza. En la ŝtuparejo estis ankoraŭ malhele. Hlapiĉ atingis kun la ujo la unuan, tiam la duan kaj fine ankaŭ la trian etaĝon. La tria etaĝo estis tiom alte, ke tie la luno ankoraŭ enrigardis tra fenestroj.

La ŝtuparejo estis ankoraŭ tute malluma kaj en la mallumo kuŝis io tute nigra. Nur du punktoj brilis kvazaŭ du ruĝaj kandeloj. Tio kompreneble estis kato, kies okuloj brilis kvazaŭ du ruĝaj kandeloj. "Ho, mi petas", diris Hlapiĉ al la kato, "mi jam alportis la lakton, nur bonvolu montri al mi la vojon." La kato ĝoje levis sian voston kaj ekkuris antaŭ Hlapiĉ al proksima pordo. Ĉe ĝi Hlapiĉ serĉis sonorilon kaj sonorigis.

Servistino malŝlosis la pordon kaj malfermis ĝin.

Kiam ŝi vidis la buntan Hlapiĉ, la servistino timiĝis, ekkriis plenvoĉe kaj manklakis. La kato timiĝis de ŝia kriado kaj saltis sur la kapon de Hlapiĉ, de lia kapo al la ŝultro de la servistino kaj de la ŝultro - ŝmac - rekte en poton plenan je akvo.

Se iu povintus vidi tiun komedion!

La kato miaŭis, la akvo ŝprucis, la poto ruliĝis, Hlapiĉ saltis por ne malsekigi la botetojn kaj la servistino ridegis tiom forte, ke fenestrovitroj tremis.

"Ho! Ho!", ridis la servistino "kia bunta monstro vi estas? Ĉu vi estas papago aŭ vi estas pego aŭ kiu vi estas?"

"Vi malpravas, fraŭlino", diris Hlapiĉ. "Mi estas Hlapiĉ kaj mi portas al vi lakton. Maljunulo estas malforta kaj li ne povas grimpi laŭ la ŝtuparo. Sed estus pli bone, se vi ne estus kriinta."

La servistino ne plu ridis.

Ŝi prenis la lakton de Hlapiĉ kaj kiam li volis foriri kun malplena laktujo, la servistino prenis kandelon kaj akompanis Hlapiĉ suben laŭ la ŝtuparo, ĉar Hlapiĉ plaĉis al ŝi.

"Kial vi, fraŭlino, ne iras ĉiutage malsupren preni la lakton? Se vi povas nun min akompani, vi povas ankaŭ mem malsupreniri por preni la lakton", diris Hlapiĉ. "La maljunulo estas tre malforta kaj li ne povas porti la lakton al la tria etaĝo."

La servistino ekhontis, ke ŝi ne mem ekpensis pri tio kaj ŝi promesis al Hlapiĉ, ke ŝi estonte ĉiam mem iros suben preni la lakton.

Hlapiĉ rekompence promesis, ke li alportos al ŝi florojn post la vojaĝo.

Kiam Hlapiĉ venis suben al la maljunulo, li demandis ĉu li rajtas pluhelpi distribui la lakton, ĉar la ĉaro ankoraŭ estis plena.

La maljunulo ĝoje akceptis tion kaj Hlapiĉ kaptis la bridilojn de la azeneto kaj ekdistribuis la lakton. La saĝa azeno sciis mem, en kiujn domojn oni devas porti la lakton kaj ĝi haltis ĉie antaŭ enirpordo. Hlapiĉ tre miris pri la saĝeco de la azeno kaj li demandis la maljunulon, kial homoj tiom saĝan beston nomas azeno?

La maljunulo ja estis tre maljuna, sed li tamen ne sciis respondi al Hlapiĉ.

"Kiam mi naskiĝis, azenoj jam havis tiun nomon", diris la maljunulo.

Tio ne plaĉis al Hlapiĉ kaj li ekbedaŭris, ke li ne kapablas skribi tiom bone. "Se mi kapablas pli bone skribi, mi verkus libron pri tio, ke tiuj saĝaj bestoj estu iel pli bele baptitaj kaj la nomo azeno restu por tiuj estaĵoj, kiuj meritas ĝin", diris Hla-

piĉ.

Sed la saĝa azeno ne zorgis pri tio kiel homoj nomas ĝin aŭ pri tio kion rakontas Hlapiĉ kaj la maljunulo pri ĝi, sed ĝi daŭre haltis antaŭ pordoj, kie tio etis bezonata.

Hlapiĉ ĉiufoje kaptis la laktujon kaj ventrapide kuris laŭŝtupe.

Tiel la ĉaro baldaŭ estis malplena. Nur restis unu malgranda ujo, por ke la maljunulo matenmanĝu.

La maljunulo dankis al la bona Hlapiĉ kaj ofertis al li kuntrinki la dolĉan lakton. Tiam la maljunulo pluiris kun la azeno kaj sia ĉaro kaj Hlapiĉ daŭrigis sian vojaĝon.

Jam estis hela tago.

Ankoraŭ iom iris Hlapiĉ kaj fine li eliris el la urbo. Kaj ankoraŭ iom li iris kaj ne plu videblis ajna domo sed nur grandaj kampoj, arbustoj, arboj kaj longa strato. La urbo ne plu videblis.

"Dank al Dio", diris Hlapiĉ kaj sidiĝis sub iun arbon.

Li estis tre laca, ĉar li dum la nokto malmulte dormis. Tial li metis ruĝan sakon sub la kapon kaj kuŝiĝis en profundan herbostokon. La herbo estis mola sed tamen estis sufiĉe malmole kuŝi en ĝi. Sed Hlapiĉ kvazaŭ leporo profunde endormiĝis sur la herboj.

Li nur dormu. Pleje gravas, ke majstro Mrkonja malproksimas kaj ke Hlapiĉ ne scias, kiom da bono kaj kiom da malbono atendas lin dum la vojaĝo.

Se li tion sciis, li ne dormus tiom trankvile.

GRANDA KAPO MONTRIĜAS TRA LA HERBOJ

Hlapiĉ dormis tre bone kaj longe sur la herboj.

Apud li sur la strato pasis multaj ĉaroj, multaj vilaĝanoj kaj vilaĝaninoj. Ĉevaloj stampfis sur strato, homoj parolis kaj kriis, ĉaroj knaris kaj anseroj, kiujn vilaĝaninoj portis en la urbon, blekis.

Hlapiĉ dormis kaj aŭdis nenion, kvazaŭ li havus sambukon en oreloj. En altaj herboj neniu vidis lin.

Tiel baldaŭ tagmezis. Surstrate estis neniu plu.

Subite Hlapiĉ vekigis. Li aŭdas ion treniĝi en la herboj kvazaŭ io ŝtelirus kaj ŝtelrampus. Li pli kaj pli bone aŭdis iujn paŝetojn. Kaj tiam li aŭdas tute apud si laŭtan spiradon kaj blovadon.

Tio ŝajnis stranga al li.

Hlapiĉ estis laca kaj li ankoraŭ nek bone vidis nek aŭdis. Tial li volis iom leviĝi por vidi, kio rampas kaj marŝas en la herboj pli kaj pli alproksimiĝante al li.

En tiu momento montriĝis tute proksime al Hlapiĉ granda, hirta, flava kapo kaj ĝi eligis longan kaj ruĝan langon.

Tio estis vere tre stranga kaj sufiĉe teruriga. Eble iu alia estus teruriginta. Sed Hlapiĉ nur saltis kaj brakumis tiun grandan, hirtan kapon!

Tio nome estis lia kara hundo Bundaŝ. Bundaŝ sekvante Hlapiĉ forkuris de majsro Mrkonja kaj li tiom longe snufis kaj serĉis kaj kuris ĝis li trovis Hlapiĉ.

Bundaŝ eklekis per sia longa, ruĝa lango la manojn de Hlapiĉ kaj Hlapiĉ senĉese brakumis kaj brakumis lin.

"Tio estas bela, kara mia Bundaŝ!", ripetadis Hlapiĉ.

Tiam pro ĝojo ili ĵetadis sin kaj ruliĝis en la herboj kiel du

pilkaj. Kiam ili satiĝis pri tio, Hlapiĉ diris: "Nun bonvolu sidiĝi, kaj ni manĝos."

Bundaŝ estis tiom ĝoja, ke li nur postkuris muŝojn kaj akridojn.

Hlapiĉ sidiĝis sur la herbojn kaj elprenis el la sako panon, lardon kaj tranĉileton. Tiam li krucsignis, formetis la ĉapon kaj ekmanĝis. Unu lardpecon li metis en sian buŝon kaj alian li ĵetis al Bundaŝ. Bundaŝ ĉiun pecon atendis saltante kaj li tuj traglutis ĝin.

Tiam Hlapiĉ fortranĉis alian panpecon por si kaj la sekvan li ĵetis al Bundaŝ. Kaptŝmacis Bundaŝ kaj la pano ne plu ekzistis! Tiel Hlapiĉ kaj Bundaŝ sufiĉe rapide finmanĝis, ekstaris kaj daŭrigis la vojaĝadon.

Estis varme kaj la strato estis longa, blanka kaj polvoplana.

DOMO KUN BLUA STELO

Longe iris Hlapiĉ kaj Bundaŝ sur la strato. Sed fine iliaj plan-dumoj ekdoloris.

Ili ĵus estis venintaj al iu malgranda malriĉula dometo. La dometo estis neriparata kaj kurbiĝinta kaj ĝi havis du fenestretojn. Sub la fenestretoj estis per blua farbo pentrita granda stelo. Tiu stelo videblis jam el malproksimo kaj pro ĝi la tuta dometo aspektis kiel ridanta maljunulino.

En la domo iu forte ploris. Pro tio Hlapiĉ tre bedaŭris rememorinte, ke li diris, ke li iras tra la mondo por helpi al tiuj, kiuj bezonas helpon. Tial li eniris en la domon por vidi, kio tie okazis.

En la ĉambro Hlapiĉ trovis knabon, kiu nomiĝis Marko kaj kiu sole sidis sur benko kaj ploris. Li estis samgranda kiel Hlapiĉ kaj li ploris ĉar paŝtante li perdis du anserojn. Tio kompreneble ne estis iu terura malfeliĉo, sed por la knabo ĝi estis! Marko ne havis patron kaj lia patrino estis malriĉa kaj pro tio Marko devis atenti pri la anseroj, ĉar ĉiu ansero valoris tricent kronojn.

Kiam Hlapiĉ en la verda pantalono kun la ruĝa ĉemizo kaj brilaj botetoj eniris la ĉambron, Marko tiom ekmiris, ke li malfermis la buŝon kaj ĉesis plori.

"Kial vi tiom forte ploris?", demandis Hlapiĉ Markon.

"Mi perdis dum paŝtado du anserojn", diris Marko kaj li ankoraŭ pli forte ekploris.

"Tio tute ne gravas", diris Hlapiĉ. "Ni trovos ilin. Ek, ni iru serĉi ilin."

Bundaŝ, Hlapiĉ kaj Marko ekiris serĉi la anserojn.

Proksime troviĝis granda akvo apud kiu Marko ĉiam iris paŝti anserojn kaj nun li kondukis Bundaŝ kaj Hlapiĉ tien. Hlapiĉ ankoraŭ neniam vidis tiom grandan akvon, ĉar ĝis nun li ĉiam nur vivis en la urbo. Ĉirkaŭ la akvo troviĝis multaj arbustoj kaj malproksime transe, apudborde, kreskis vergoj el akvo.

Kiam ili alvenis tien, Marko denove ekploris.

"Ho ve, ho ve! Mi neniam retrovos miajn anserojn." Marko tiom ploris, ke Hlapiĉ devis pruntedoni al li sian bluan tukon por viŝi la larmojn.

Ankaŭ al Hlapiĉ ŝajnis, ke ne eblas apud tiom granda akvo trovi du anserojn, kiuj estas tiom malgrandaj. Sed li ne volis tion ke li ne malgajigu Markon kaj li ekserĉis kun Marko la anserojn en arbustoj. Intertempe Bundaŝ kuris, flaradis kaj bojis ĉirkaŭ ili pli kaj pli forte.

Subite hirta Bundaŝ ekkuregis kaj saltis en la akvon kaj ekknaĝis tra la granda akvo.

"Bundaŝ! Bundaŝ!", krivokis Hlapiĉ, sed Bundaŝ ne reagis, li nur skuis la kapon kaj plunaĝis al alia flanko de la akvo kaj malaperis inter vergoj.

Hlapiĉ jam pensis, ke ankaŭ Bundaŝon li perdis. Kaj se Bundaŝ perdiĝintus, ankaŭ Hlapiĉ ekplorus! Sed Hlapiĉ nun ne povis plori, ĉar li pruntedonis sian tukon al Marko. Krome li ne havis tempon por plori, ĉar de trans la akvo el inter la branĉoj aŭdeblis svingado kaj batado de flugiloj kaj laŭta anserblekado kaj ankoraŭ pli laŭta bojado. Tio kompreneble estis anseroj de Marko kiujn Bundaŝ serĉis kaj trovis trans la akvo. Tien kompreneble Marko kaj Hlapiĉ neniam povintus alveni.

Marko saltadis pro ĝojo kiam Bundaŝ ekpelis la anserojn al li. La anseroj naĝis antaŭe kaj forte malfermadis la bekojn kolere blekante. Bundaŝ postnaĝis pelante la anserojn kaj li same kolere bojis.

Sed ĉio bone finiĝis kaj Bundaŝ feliĉe alpelis la anserojn ĝis Marko kaj Hlapiĉ kaj eliris ĝoje el la akvo.

"Kiom saĝa vi estas! Kiam mi riĉiĝos, mi aĉetos al vi kolbason por dek kronoj", diris Hlapiĉ al Bundaŝ.

Tiam Marko kaptis unu, Hlapiĉ alian anseron, ili prenis la anserojn subakselen kaj foriris hejmen. Ili tiom ĝojis, ke ili fajfadis dumvoje kiel merloj.

Dum ili tiel iris, diris Marko al Hlapiĉ:

"Kian grandan kapon havas via Bundaŝ!"

"Ja pro tio li estas tiom saĝa", diris Hlapiĉ. "Se vi havus tiom grandan kapon, vi estus trovinta anserojn sen Bundaŝ!"

Tiam ili revenis al la domo de Marko. La patrino de Marko estis jam hejme kaj ŝi permesis al Hlapiĉ dormi ĉe ili, ĉar ŝi estis

tre feliĉa, ke Bundaŝ trovis la anserojn. Tiel Bundaŝ certigis por Hlapiĉ unuan tranoktejon. Jam estis vespero kaj Marko kaj Hlapiĉ sidiĝis sur grandan ŝtonon antaŭ la domo kaj ili ricevis en granda bovlo maizkaĉon kun lakto kaj du grandajn, lignajn kule-rojn.

Dum ili vespermanĝis, demandis Hlapiĉ:

"Kiu desegnis tiun bluan stelon sur la domo?!"

"Mi", respondis Marko. "Kiam la patrino kolorigis la ĉam-bron, mi prenis la farbon kaj desegnis la stelon. Mi pensis, ke miaj anseroj rekonos la domon laŭ la stelo. Sed nun mi vidas, ke tio estis vana kaj ke la anseroj transiras la akvon senkonsidere pri tio, ĉu ekzistas aŭ ne ekzistas stelo sur la domo."

Sed Hlapiĉ bone memoris tiun stelon. Kaj ĉiu, kiu legas tiun ĉi libron, memoru ĝin. Tion li bezonos, kiam venos danĝeraj tagoj por Hlapiĉ.

Tiel Marko kaj Hlapiĉ paroladis kaj vespermanĝis kaj poste ankaŭ Bundaŝ ricevis maizkaĉon. Poste ili iris dormi.

Kompreneble Hlapiĉ dormis nek endome nek enlite, ĉar en la dometo ne estis loko por li.

Hlapiĉ dormis en la stalo.

En la korto nome troviĝis malgranda kaj malnova stalo kaj en ĝi fojno.

Hlapiĉ devis grimpi al la subtegmentejo laŭ ŝtupetaro kaj tiam li devis enŝoviĝi en la subtegmentejon tra iu eta aperturo. Kiam li jam estis en la subtegmentejo, Hlapiĉ turniĝis, reelŝovis sian kapon tra la aperturo kaj kriis:

"Bonan nokton!"

En la korto estis neniu plu. Estis malhela nokto kaj la korto aspektis kvazaŭ granda, nigra truo. Supre en la ĉielo estis tiom da steloj kiom, Hlapiĉ ankoraŭ neniam vidis.

Tiam Hlapiĉ demetis kaj viŝis siajn belegajn botetojn, kuŝiĝis sur la fojno kaj endormiĝis.

Antaŭ la stalo dormis Bundaŝ, sur la stalo dormis Hlapiĉ kaj en la stalo dormis bela, bunta bovino.

Tio estis unua tago de la vojaĝo de Hlapiĉ kaj ĝi estis bonŝance pasinta. Dio scias, kion portos la dua tago!

LA DUA VOJAĜTAGO

HLAPIĈ KAJ ŜTONHAKISTOJ

Frumatene ekkokerikis kokoj kaj ekblekis anseroj, la bovino eksonoris kaj Bundaŝ komencis boji kaj ĝemi, ĉar li ne vidis Hlapiĉ-on.

Ĉio kune kaŭzis tian bruon ke Hlapiĉ vekigis kaj li pensis, ke li troviĝas en bestejo. En vilaĝoj estas ĉiumatene tia bruo kvazaŭ en bestejo, sed Hlapiĉ ĝis nun ne sciis tion.

Hlapiĉ do vekigis, surmetis la botetojn kaj malsupreniris de la subtegmentejo laŭ la ŝtuparo. Li dankis al la patrino de Marko kaj ŝi donis al li grandan panpecon kaj tri kuiritajn ovojn por la vojaĝo.

Hlapiĉ kaj Bundaŝ pluiris laŭ sia vojo kaj estis trankvila antaŭtagmezo, kiun ili pasigis dum sia vojaĝo.

Ili do iris dum iom da tempo ĝoje kaj sen zorgoj kaj tiam ili atingis lokon sur la strato, kie sidis homoj kun longaj marteloj kaj ili martelis ŝtonojn por la strato. Iuj el inter tiuj homoj havis grandajn, nigrajn okulvitrojn ĉar ili timis, ke iu ŝtonpeceto forsaltos en la okulon. Aliaj ne havis okulvitrojn, kaj ili ne timis sed ĝoje kantis.

Tiuj lastaj tre plaĉis al Hlapiĉ kaj li tuj sidiĝis al ili por kunkanti. Hlapiĉ bone konis ilian kanton, ĉar ĉiuj ĝojaj homoj same kantas.

Kiam ili sufiĉe kantis, demandis Hlapiĉ la ŝtonhakistojn, ĉu malfacila vojo atendas vojaĝantojn? La ŝtonhakistoj kapablis kompreneble bone respondi al tiu demando, ĉar ili ĉiam sidas apud la strato kaj vidas ĉiun vojaĝanton.

Iu ŝtonhakisto respondis al Hlapiĉ:

"Por tiu, kiu havas fortajn ŝuojn, firmajn pugnojn kaj saĝan kapon bonas la vojo."

"Kaj por tiu, kiu ĉion tion ne havas?" demandis Hlapiĉ.

"Por tiu ankaŭ estas bone, ĉar jam en la unua vilaĝo li tediĝas pri la vojaĝo kaj ekiras hejmen.", respondis la ŝtonhakisto.

Tiam Hlapiĉ ekstaris por daŭrigi la vojaĝon. Sed antaŭ la foriro ili ankoraŭfoje kune ridis pro iu rakonto.

Alvenis nome iu tute eta, bunta bovido, kiu marŝis ne sciante mem kien. Etaj bovidoj efektive iras sed ili neniam scias kien. Kaj ĝuste tiu eta, bunta bovido volis ekbatali kun Hlapiĉ. Ĝi klinis la kapon kaj saltis por bati Hlapiĉ-on.

"Ek! Ek! Ekbatalu!" ekridis la ŝtonhakistoj "Vi estas la ĝusta paro!"

"Ni fakte estas samgrandaj sed ni ne estas paro!" respondis Hlapiĉ, ekridis, suprenfaldis la manikojn kaj ekbatalis kun la bunta bovido.

Du-tri foje aŭdeblis: frap-frap kaj poste: bat-bat! Hlapiĉ batis per siaj firmaj pugnoj kaj la bovido per sia bunta kapo.

La bovido forsaltis malantaŭen por povi pli forte ekkuri al Hlapiĉ.

"Ek! Ek! Nur kuru rapide!" kriis Hlapiĉ al la bovido.

Kaj vere, la bovido ekkuris plenforte kontraŭ Hlapiĉ.

Tiam Hlapiĉ forsaltis flanken kaj la bovido klininte sian kapon trakuris apud Hlapiĉ kaj - ho ve - rulfalis kapen en apudstratan fosaĵon kvazaŭ kukurbo.

Hlapiĉ per ambaŭ manoj aplaŭdis sur siaj genuoj kaj ridis dum la bovido baraktis sube en la fosaĵo. Kiam la bovido ekstaris sur siajn maldikajn kruojn, ĝi levis sian buntan voston kaj fuĝis tiudirekten, kie ĝi rememoris, ke estas ĝia patrino.

Hlapiĉ kaj la ŝtonhakistoj rigardis post ĝi kaj ridis. Kaj tiam Hlapiĉ malfaldis siajn ruĝajn manikojn kaj diris:

"Mi jam de longe legis en ŝuista kalendaro: "Kie freneza kontraŭ la saĝa batalas, tie la batalo malegalas""

Tiam Hlapiĉ adiaŭis la ŝtonhakistojn kaj ili diris:

"Vojaĝu feliĉe! Viaj botetoj etas firmaj kaj ni ĵus vidis, ke vi havas bonan kapon kaj fortajn pugnojn."

Tion Hlapiĉ volonte aŭdis kaj daŭrigis la vojaĝon.

Tiun tagon estis granda sufokeco kaj certe vespere estos fulmado, pluvo kaj tondroj.

NIGRA HOMO

Vespere tiun tagon estis Hlapiĉ daŭre surstrate. Li tiutage jam trapasis vilaĝon, sed li ne volis halti en ĝi, ĉar li volis laŭeble plej malproksimiĝi de la urbo, en kiu estis majstro Mrkonja.

Marŝis do Hlapiĉ, marŝis sur la strato, sed vespere subite ekblovis forta vento, ekfulmis kaj ektondis. Komence tondis el la malproksimo kaj malforte kaj poste ĉiam pli proksime kaj pli forte.

Fulmotondro bruegis kvazaŭ fera ĉaro veturus sur la ĉielo. Bundaŝ timis fulmotondrojn kaj premiĝis al Hlapiĉ. "Tio estas nenio" diris Hlapiĉ kaj pluiris. Tiam ekfulmis ankoraŭ pli forte kaj aŭdeblis terura tondro en la malproksimo. Bundaŝ skuiĝis pro timo sed Hlapiĉ diris: "Ankaŭ tio estas nenio. Ni pluiru."

Li devis teni sian ĉapon, ke la vento ne forblovu ĝin kiom forte blovegis. Tiam venis tiom nigraj nuboj, ke iĝis preskaŭ

tiom mallume kiel nokte. Nur kiam fulmis videblis la tuta ĉielo kvazaŭ fajro brulus en ĝi.

Ekpluvis grandaj pluvgutoj.

"Nun ni devas kaŝiĝi." diris Hlapiĉ, kiu plej zorgis pri siaj botetoj. Hlapiĉ rigardis ĉirkaŭ si kaj ne sciis, kien kaŝiĝi, ĉar ĉie estis nur kampoj kaj arboj kaj nenie domo aŭ homo.

Estis tre bone ke Bundaŝ kaj Hlapiĉ estis kune. Kelkfoje estis pli saĝa Bundaŝ kaj kelkfoje Hlapiĉ kaj tiel ili ĉiam helpis unu la alian.

Ĉi foje Bundaŝ estis pli saĝa. Sur la strato estis ponto kaj Bundaŝ ektrenis Hlapiĉ-on sub tiun ĉi ponton.

"Vi vere estas saĝa!", diris Hlapiĉ al Bundaŝ, kiu tiris lin sub la ponton.

Kiam Hlapiĉ ŝoviĝis sub la ponton, subite li ektimis.

Ja kiu ne surpriziĝus kaj timiĝus! Sub la ponto sidis iu homo surhavanta longan, nigran pluvmantelon kaj ŝiritan ĉapelon surkape. Bundaŝ laŭte ekbojis kontraŭ li. Sed nun Hlapiĉ estis pli saĝa ol Bundaŝ, ĉar li ekpensis: necesas ĉiam esti afabla kaj ĝentila!

Li ordonis al Bundaŝ silenti kaj li mem salutis la homon:

"Bonan tagon", diris Hlapiĉ.

"Bonan tagon" respondis la homo: "De kie vi venis ĉi tien?"

"Ekstere pluvas kaj mi timas pro miaj botoj. Ĉu vi permesos al mi kaj Bundaŝ resti ĉi tie?", demandis Hlapiĉ.

"Vi povas resti", diris la homo "sed ĉi tie ne estas tre bele."

Sub la ponto vere estis malvaste kaj malbele. Tie ne eblis stari sed nur sidi aŭ kaŭri.

La vento terure blovegis, la pluvo kun hajlo batis sur la ponton kvazaŭ marteloj batus kaj fulmotondro estis tiom forta, ke ne eblis interparoli sub la ponto, ĉar oni ne povis aŭdi unu la alian.

Do Hlapiĉ, Bundaŝ kaj la nekonato kaŭris sub la ponto.
Bundaŝ senĉese grumblis kontraŭ la homo kaj al Hlapiĉ li ankaŭ ne tre plaĉis. Hlapiĉ pli ŝatintus, se li estus sola kun Bundaŝ sub la ponto.

Pluvis longe kaj daŭre same fulmotondris. Estis jam vespero.

"Ni devos ĉi tie dormi ĉi-nokte", diris la homo.

Hlapiĉ vidis, ke la homo pravas, ĉar ekstere pluvegis kaj ne eblis ien ajn foriri.

Sub la ponto troviĝis pajlo, kvazaŭ iu jam dormintus tie.

Hlapiĉ sternis la pajlon kaj pretigis kuŝejon por si kaj tiu alia homo.

Li demetis la botetojn, viŝis ilin kaj metis apud si. La sakon li metis sub la kapon kaj kuŝiĝis sur la pajlon.

La homo volviĝis en sian pluvmantelon kaj ankaŭ li kuŝiĝis sur la pajlon.

Hlapiĉ diris "Bonan nokton" kaj la homo respondis "Bonan nokton".

Nun Hlapiĉ kruksigne laŭte preĝetis.

Tiam li malrapide levis la kapon por vidi ĉu ankaŭ la homo kruksignos. Sed li ne kruksignis, li nur turniĝis al alia flanko kaj ekronkis kiel lupo.

Tio ne plaĉis al Hlapiĉ. Tial li ankoraŭfoje kruksignis kaj brakumis Bundaŝ, ĉar estis iom malvarme sub la ponto. Tiam li trankvile endormiĝis.

Tio estis la dua vojaĝtago de Hlapiĉ. Tre agrabla ĝi ne estis, sed dum ĉiu vojaĝo estas ankaŭ problemoj! Hlapiĉ ĝojis, ke li morgaŭ surmetos siajn botetojn kaj pluiros sur sia vojo. Tiel li tamen ĝoje endormiĝis.

LA TRIA VOJAĜTAGO

GRANDA MALĜOJO

Tiel dormis sub la ponto Hlapiĉ, Bundaŝ kaj la nekonato en nigra pluvmantelo. Dum la nokto Bundaŝ subite ekgrumblis kaj ekbojis. Hlapiĉ estis tre dormema kaj li brakumis Bundaŝ-on ankoraŭ pli forte kaj diris:

"Silentu Bundaŝ!" Bundaŝ resilientiĝis kaj ili pludormis.

Kiam tagiĝis, Hlapiĉ vekigiĝis. Li tuj vidis, ke la homo en la nigra pluvmanrelo ne plu ĉeestas. Li foriris, dum Hlapiĉ dormis. Hlapiĉ ne malgajis pro tio. Li ĝoje ekstaris kaj volis surmeti siajn botetojn.

Sed kion Hlapiĉ nun vidis, estis terura! Liaj botetoj estis for. Ili ne troveblis sur la pajlo nek sub la pajlo. Ili estis nenie! Tiu homo forportis ilin.

"Ho, Dio mia!", eksuspiris Hlapiĉ vidinte, ke liaj botetoj ne plu estas. Pro malĝojo li kunmetis la manojn kaj restis dum momento enpensita.

Ĉiu infano plorus, se iu ŝtelus de ĝi tiom belajn botetojn. Kompreneble plorus ĉiu infano, se ĝi restus nudpieda dum longa vojaĝo!

Sed Hlapiĉ ne ploris. Li pripensis dum momento, salte ekstaris, vokis Bundaŝ-on kaj diris:

"Ni ekiru Bundaŝ, serĉi tiun homon. Ni trovos lin eĉ se ni serĉos dum dek jaroj kaj ni ricevos la botojn eĉ se li pendigis ilin al la imperiestra kamentubo!"

Hlapiĉ ekiris nudpiede serĉi siajn botetojn.

Tio estis komenco de liaj plej strangaj travivaĵoj.

Ne estis simpla afero serĉi la botojn. La lando estas tre granda kaj en ĝi estas multaj lokoj, en kiuj la nigra homo povis kaŝi la botojn.

KNABINO SUR LA VOJO

Iris tiel Hlapiĉ, iris sur la strato kaj enpensiĝis, kvazaŭ li irus al la kvara klaso de la lernejo. Tamen li ne iris al la lernejo sed serĉi siajn botetojn kaj tio estas eĉ pli malfacila.

Post kiam Hlapiĉ marŝis pli ol duonan horon, li rimarkis sur la strato antaŭ si iun belan, malgrandan knabinecon.

La knabineco havis libere falantajn harojn kaj surŝultre portis etan, verdan papagon. Ŝi iris rapide, ĉar ankaŭ ŝi vojaĝis. Tial ŝi portis enmane pakaĵon ligitan en ruĝa tuko. En la pakaĵo estis ŝiaj roboj kaj tolaĵoj kaj aliaj aferoj.

La knabino apartenis al iu cirko kaj ŝi nomiĝis Gita. Tio estas iom stranga nomo, sed en cirko ekzistas multaj strangaj aferoj.

Al Hlapiĉ Gita jam el la malproksimo ŝajnis tre bela, ĉar ŝi surhavis bluan vestaĵon ĉirkaŭkudritan per arĝenta rubando. La vestaĵo fakte estis sufiĉe disŝirita sed tio ne gravas! Gita havis blankajn ŝuojn kun ora kroĉilo. Ankaŭ la ŝuoj estis sufiĉe malnovaj kaj flikitaj sed ankaŭ tio ne gravas! Gita tamen ŝajnis tre bela al Hlapiĉ kaj li ekrapidis por atingi ŝin.

"Bonan matenon!", diris Hlapiĉ alveninte al Gita. Sed imagu, kiom li miriĝis, kiam anstataŭ Gita respondis ŝia papago:

"Bonan matenon! Bonan matenon! Bonan matenon!"

Tri foje diris la papago "bonan matenon". Ĝi estis tiom pa-

rolema, ke ĝi ok tagojn senĉese diradus "bonan matenon", se Gita ne estus preminta ĝian bekon. Tiam ekinterparolis Gita kun Hlapiĉ.

Gita rakontis, ke ŝia estro lasis ŝin en iu vilaĝo, ĉar ŝi estis malsana. La estro pluiris kun la cirko tra du vilaĝoj kaj unu urbo al tria vilaĝo kaj li diris al Gita, ke ŝi postsekvu, kiam ŝi resaniĝos.

"Nun mi vojaĝas perpiede al la tria vilaĝo", diris Gita "Tio estas tre malproksima kaj teda."

"Mi ankaŭ vojaĝas", rediris Hlapiĉ "ni iru kune."

"Ni iru.", diris Gita "Mi estas tre malĝoja. Ĉi-matene ŝtelis iu sur la strato mian skatolon, dum mi iris al puto por trinki akvon. En la skatolo mi havis ĉiaspecajn aferojn. Ankaŭ miaj oraj orelingoj estis ene."

"Kaj mi iu ŝtelis botetojn.", diris Hlapiĉ. "Ne malgaju. Ni trovos kaj la orelingojn kaj la botetojn. Ni iru pluen".

"Ni iru," diris denove Gita "sed mi estas tre malsata!"

"Dio mia", pensis Hlapiĉ "malfacilas aranĝi aferojn kun knabinoj! Antaŭ ne longe ŝi estis malĝoja kaj nun ŝi jam estas malsata."

Tamen Gita pli kaj pli plaĉis al Hlapiĉ kaj tial li diris laŭte:

"Ni trovos en la vilaĝo iun laboron kaj tiam ni ne plu estos malsataj. Kian laboron vi kapablas plenumi, ke ni povu oferti nin al iu vilaĝano?"

Tion demandis Hlapiĉ kaj Gita respondis fiere:

"Ho, mi kapablas multon! Mi kapablas rajdi, mi kapablas stari sur ĉevalo, salti tra ringo, mi kapablas pilkludi per dekdu pomoj samtempe, mi kapablas mordi la plej dikajn vitran glason kaj ankaŭ formanĝi ĝin kaj ankoraŭ multajn aferojn mi kapablas, kiujn oni faras en cirko."

Nun Hlapiĉ ekridis tiom forte, ke vi tute ne povas imagi tion!

Li tiom ridis, ke la ĉapo falis de sur lia kapo.

"Ĉio, kion vi kapablas ne tro multe helpos al ni dum laboro. Se vi pilkludos per pomoj kaj glutos glasojn, neniu vilaĝano akceptos vin labori!", diris Hlapiĉ.

Gita pro tio koleriĝis. Sed Hlapiĉ donis al ŝi la lastan panpeceton el la sako kaj tiam ili ĉiuj kune pluiris por serĉi la laboron en la vilaĝo.

Unuflanke iris Hlapiĉ, aliflanke Gita kaj meze Bundaŝ. Sur la ŝultro de Gita estis la papago. Temis pri tre bunta kaj stranga societo sur la strato.

SUR FOJNOHERBEJO

Hlapiĉ tiom bele fajfis survoje, ke ili ĉiuj kune paŝis rapide kaj forte kvazaŭ soldatoj. Tial ili rapide alvenis en la unuan vilaĝon.

Tie iu mastro falĉis fojnon kaj havis multajn taglaboristojn.

Hlapiĉ venis al la mastro kaj demandis:

"Ĉu vi bezonas bonajn taglaboristojn?"

La mastro miris, ĉar Hlapiĉ kaj Gita estis tiom malgrandaj kaj buntaj kaj ili havis la papagon kaj hundon.

"Pro kio vi estas bonaj laboristoj?" demandis ilin la mastro.

"Ĉar ni nenion scias kaj ni volonte ĉion lernus", respondis Hlapiĉ.

Al la mastro plaĉis tiu respondo kaj kvankam li ankoraŭ neniam havis tiajn laboristojn, kiaj estis Gita kaj Hlapiĉ, li tamen akceptis ilin al la laboro kaj diris al ili, ke ili turnadu la falĉitan fojnon. Li havis multajn laboristojn, kiuj rapidis sekigi la fojnon.

La laboristoj estis ĝuste nun matenmanĝantaj kaj ili donis al Gita kaj Hlapiĉ lardon kaj panon.

Kiam ili satiĝis, ili ĉiuj kune eklaboris. La papagon kaj sian pakajon metis Gita sur iun branĉon.

Hlapiĉ kaj Gita ricevis grandan, lignan forkegon kaj ili devis turnadi la fojnon kaj orde amasigi ĝin.

Hlapiĉ estis tre forta kaj lerta kaj li tuj laboris tiom lerte, ke la fojno nur flugis ĉirkaŭ li kvazaŭ plumoj.

Sed Gita estis maldiligenta. Ŝi tediĝis labori, ĉar en la cirko ŝi kutimis fari nenion seriozan.

Ŝi do du-tri foje svingis per forkego, faris ian oblikvan fojnamaseton kaj sidiĝis sur ĝin.

"Hlapiĉ, al mi estas tro varme", diris unue Gita. Sed Hlapiĉ ne aŭskultis. Li plu laboris.

"Hlapiĉ, mi denove malsatas", diris iom pli poste Gita.

Hlapiĉ denove ne respondis sed plu laboris. Li tiom bele ordigis la fojnon kvazaŭ tabakon en skatolon kaj li faris jam tri grandajn amasojn kiel tri turojn. Gita dume ankoraŭ pli kolere, ke Hlapiĉ ne respondas kaj la laboro estis ĉiam pli teda.

Pro tio ŝi kolere svingis per forkego kaj rompis ĝin. Tiam ŝi ekgratis tiom kolere per rastilo la herbon, ke tuj elfalis tri dentoj el ĝi. Finfine ŝi pro kolero miksis sekan kaj freŝan herbon kvazaŭ ĝi estus kaĉo en poto. Vidinte tion la mastro ekpensis:

"Mi ne bezonas tian laboriston! Kiu ne laboras, tiu ne bezonas manĝi." Li levis de sur la planko longan vergon kaj ekiris al Gita por forpeli ŝin de la laboro. Tiel ĉiam faras vilaĝanoj kun ĉiu maldiligenta laboristo. Se ili ne farus tiel, estus pli bone tute ne komenci falĉi la herbojn. Se oni ne falĉus la herbojn, ili kreskus tiom alte, ke ĉiuj maldiligentuloj kaŝiĝus en ili kaj dormus dum la tuta tago. Tiel do estas plej bone.

Sed Gita jam de malproksime rimarkis, ke venas la mastro kun la vergo. Ŝi kompreneble ne volis atendi, ke la mastro alproksimiĝu, sed ŝi rapide forĵetis la rastilon, kaptis sian papagon, prenis la pakaĵon kaj forkuris lerte kiel sciuro en arbustojn.

Kaj Bundaŝ, kiu ankaŭ tre volonte ludis, ekkuris tuj post ŝi.

En la arbustoj havis laboristoj tute etan ĉaron, en kiu ili alveturigis trinkakvon. Tie malantaŭ la ĉaro kaŝiĝis Gita kun Bundaŝ.

"Mi ne plu vidu vin!", kriis post ŝi la mastro.

Tiel Gita forlasis la laboron kaj kiu scias, kia ideo aperis en ŝia cirka kapeto!

Hlapiĉ tion vidis kaj li ne opiniis, ke tio estis ĝusta. Li restis ĉe sia laboro kaj pensis jene: "Gita ne kulpas, ke ŝi ne kapablas labori, se neniŭ instruis al ŝi. Kaj nun, dum ni kune vojaĝas mi devas zorgi pri ŝi kaj mi donos al ŝi duonon de mia vespermanĝo."

Tiel pensis la bona Hlapiĉ kaj restis labori. Li laboris rapide kaj ĝoje dum la tuta tago, ke li perlaboru vespermanĝon por si kaj Gita.

Gita, Bundaŝ kaj la papago ne reaperis ĝis la vespero. Ili manĝis verŝajne rubusojn kaj frambojn en la arbustoj kaj kion ili krome faris dum la tuta tago estis videble vespere.

Tio estis gaja vespero kaj indas rakonti ĝin kvankam ĝi ne estis grava. Sed por multaj homoj ĉiukaze plej grava estas tio, kio estas gaja.

PREZENTAĴO

Kiam vespere la laboro estis finita, sidiĝis ĉiuj laboristoj por vespermanĝi. Ili estis tiom multaj, ke ili sidis ĉe la tablo, kiu estis kvin metrojn longa. La tablo troviĝis sub grandaj kverkoj. La mastrino alportis al ili kvar grandajn potojn da fazeolo kaj tri ankoraŭ pli grandajn potojn da terpomo. Hlapiĉ sidis ĉe la tablo kun la laboristoj kaj vespermanĝis.

Hlapiĉ pensadis kiel trovi Gita-n kaj porti al ŝi la vespermanĝon. Tiumomente aŭdiĝis el la arbustoj trumpetado de malgranda trumpeto.

Ĉiuj laboristoj turniĝis tien kaj tiom surpriziĝis, ke de ĉiuj elfalis kuleroj el la manoj.

Tio, kion ili vidis survoje al la arbustoj estis vere belega.

Sur eta ĉaro veturis Gita en ora vestaĵo. La ĉaro estis tute ornamita per floroj. Al la ĉaro estis jungita Bundaŝ. Ĉirkaŭ lia kolo estis plektita girlando el kampaj floroj. Kaj ŝnuroj kaj bridoj, ĉio estis ornamita per floroj kaj Bundaŝ krome havis sur la vosto ligitajn tri larĝajn, ruĝajn rubandojn. Antaŭe sur la ĉaro estis alkroĉita alta vergo kaj sur la vergo estis eta girlando. Sur la girlando balanciĝis la papago.

Sed la plej bela estis la jeno:

En la ĉaro sidis Gita kiel reĝino en ora robo kun libere falantaj haroj kaj ŝi trumpetis je eta, ora trumpeto. La trumpeton, la robon kaj la rubandojn elprenis Gita kompreneble el sia pakaĵo.

Bundaŝ tiris la ornamitan ĉaron rekte al la laboristoj.

Kiel tiu saĝa Bundaŝ sukcesis dum unu tago lerni kiel treni la ĉaron, tio estas sekreto de Gita. Estas vera feliĉo, ke Hlapiĉ dum sia vojaĝo havas tian kamaradon, kiu en ambaŭ statoj - ĉu gajo ĉu malgajo - estas saĝa kaj bona!

Ĉiuj laboristoj ekridis kaj ekĝojis, tiom belege estis vidi Gitan en la ĉaro kaj Bundaŝ antaŭ ĝi.

Kiam Gita alveturis al la laboristoj, komenciĝis la prezentaĵo.

Gita desaltis de la ĉaro, sternis tukon el fojno kaj kliniĝinte ekdancis. Ŝi dancis, turniĝis kiel turbo, saltadis kiel birdeto kaj krome batadis la etan tamburon.

Dancante, ŝi traŝoviĝis tra malgranda ringo, kiun ŝi tenis en la mano. La ringo ŝajnis tiom malvasta, ke Gita ne povus trairi ĝin. Sed ŝi dancante traglitadis senĉese tra tiu ĉi ringo kvazaŭ feino.

Tio estis belega, sed poste sekvis io ankoraŭ pli bela.

De unu kverko al la alia alte ligis Gita ŝnuron. Ŝi grimpis rapide kiel kato sur la ŝnuron kaj paŝis sur tiu maldika ŝnuro alte en la aero. Ŝi aspektis kiel hirundo, ĉar ŝi forte dismetis la brakojn.

Hlapiĉ ege timigita kuris sub la ŝnuron por povi kapti Gitan, se ŝi estus falonta. Sed Gita ridis kaj paŝis alte supre sur maldika ŝnuro tiom sekure, kiel aliaj homoj sur la tero. Kiam ŝi troviĝis fine de la ŝnuro ŝi glitis laŭ unu branĉo al la tero tiom facile, kvazaŭ ŝi estus birdo.

"Ho! Ho! Tion mi ankoraŭ neniam vidis", diris Hlapiĉ.

"He, nun ni simple trovos la skatolon de Gita kaj miajn botetojn", ekpensis ĝoje Hlapiĉ: "Se tiu nigra homo kaŝis ilin en kelo, Gita tiom lerte traŝovas sin tra malvasta ringo, ke ŝi povos traŝovi sin eĉ tra mustruo en kelon. Se li kaŝis ilin en subtegmentejo, Gita tiom sekure marŝas en altecoj, ke ŝi promenos trans ĉiuj tegmentoj al ĉiuj subtegmentejoj kaj trovos la botetojn kaj la pakajon."

Kompreneble Hlapiĉ malĝuste esperis, kiam li tiel pensadis. Gita nome lernis traŝovi sin tra ringoj kaj marŝi sur ŝnuroj nur

pro prezentaĵoj. Por aliaj bezonoj ŝia granda kapablo utilos nek al Hlapiĉ nek al iu ajn alia.

Ĉiuj laboristoj tiom miris pri la artaĵo de Gita, ke ili tute forgesis pri siaj fazeoloj kaj terpomoj.

Poste Gita denove alpaŝis al sia ĉaro kaj prenis la vergon kun la papago kaj alten levis ĝin. Ŝi batadis malrapide perpiede la tambureton kaj ekkantis iun strangan kanton, kiun komprenas nur komediuloj kaj papagoj.

La papago tiam komencis turniĝi sur la girlando. Ĝi pendigis sin per piedoj kaj subenigis la kapon, pendigis sin per beko kaj subenigis la piedojn, ke ili pendu kaj poste ĝi afektis kaj turnadis la kapon kiel fraulinoj dum promeno. Ĝi dancis levante piedon post piedo kiel urso. Finfine ĝi ekfajfis kiel trajno kaj ekruliĝis sur la girlando.

Ĝi turniĝis tiom rapide kaj tiom ofte ĉirkaŭ la girlando, ke vere iu povus ekdubi, ĉu tio estas papago aŭ simio, kio fakte tute ne gravas.

Fine sekvis la lasta surprizo kaj ĉiuj tiom ridis, kiel ja estas la kutimo fine de ĉiu prezentaĵo. Gita nome levis la vergon kun la papago alten, kriis "Bonan nokton!" kaj svingis per la vergo kun la papago al direkto de Hlapiĉ. La papago sen pripensi forflugis kaj sidiĝis sur la ŝultron de Hlapiĉ, prenis la ĉapon de lia kapo, ĵetis ĝin sur la teron kaj ekkriĉis: "Mi riverencas! Mi riverencas! Bonan nokton!"

Ho kiel ĉiuj laboristoj kaj ankaŭ la mastro ridis pro tio! Ankaŭ Gita eksplode ridegis kiel papago. Nur Hlapiĉ staris kvazaŭ ŝtoniĝinta kun la papago surŝultre, ĉar li tute ne pensis, ke io tia povus okazi.

"Bonan nokton! Bonan nokton!", ekkris la laboristoj kaj finfine ankaŭ Hlapiĉ mem.

"Se estas komedio, estu komedio", ekpensis Hlapiĉ kaj metis la papagon sur la teron kaj kovris ĝin per sia ĉapo.

"Riverencu ankoraŭfoje", li diris al la papago.

Kompreneble la papago ne povis fari tion, ĉar la homa ĉapo kovras eĉ la plej saĝan papagon de beko ĝis vosto.

La papago kuris kune kun la ĉapo kiel blinda kokino ĝis Gita liberigis ĝin.

Kompreneble ridis ĉiuj nun ankoraŭ pli kaj tiel finiĝis la prezentaĵo.

Tiam ili donis al Gita vespermanĝi fazeolojn kaj terpomojn kaj la mastro ne plu koleris je ŝi, ĉar se iu tre ridis, tiu ne povas tuj rapide malsereni.

"Ĉu vi vidas, kiom bonega estas mia laboro!", ŝi diris fiere al Hlapiĉ.

"Tia laboro estas bona nur, kiam ne ekzistas alia laboro", respondis Hlapiĉ.

Tiam ĉiuj iris dormi.

INTERPAROLO DE HLAPIĈ KUN LA LABORISTOJ

Gita dormis en la domo kun la mastrino kaj Hlapiĉ en la fojno kun la laboristoj. Jam ĉiuj kuŝis kaj ĉiuj estis silentaj. Hlapiĉ antaŭ endormiĝo ankoraŭ eksuspiris:

"Mi hodiaŭ ne trovis miajn botojn!"

"Kiajn botojn?", demandis la laboristo, kiu kuŝis apud Hlapiĉ.

"Hodiaŭ matene ŝtelis iu miajn botojn", respondis Hlapiĉ.

"Ankaŭ al mi ŝtelis iu bluan mantelon", diris la laboristo.

"De mi ŝtelis iu hakilon", diris alia.

"De mi ŝtelis iu ŝinkon el la subtegmentejo", diris la tria laboristo.

"De mi ŝtelis iu sakon, en la sako estis mono", diris la kvara laboristo.

Nun ĉiuj sciis, ke en la vilaĝo estas ŝtelisto, kiu forŝtelis ĉiujn tiujn aferojn. Ĉiuj enpeniĝis, kiel trovi ĉiujn tiujn aferojn kaj kiu povus esti tiu ŝtelisto.

Tiam aperis la luno sur la ĉielo kaj ĉiuj endormiĝis.

LA KVARA VOJAĜTAGO

INCENDIO EN LA VILAĜO

Ankoraŭ neniam dum sia tuta vivo dormis Hlapiĉ tiom bone kiel tiun ĉi nokton sur la fojno. Somere estas vere belege dormi surfojne. La fojno bone odoras kaj ĉio ĉirkaŭe estas silenta kaj neniuj vekas. En vilaĝoj ĉiuj bonaj homoj dormas nokte. Nur strigoj kaj vespertoj estas vekaj. Sed ili flugas tiom mallaŭte, ke ili ne povis veki Hlapiĉ-on.

Bedaŭrindas nur, ke ĝuste tiam, kiam estas plej bele, ofte okazas malfeliĉoj.

Tiel okazis ankaŭ en tiu ĉi nokto.

Subite Hlapiĉ vekigis sur la fojno kaj aŭdis la laboristojn kriadi: "Fajro! Fajro!"

Li rapide saltis el la fojno. Estis ankoraŭ malluma nokto. Sed en la vilaĝo estis klara lumo, ĉar tie brulis granda fajro, ruĝa kiel tiu en la infero.

Brulis stalo de vilaĝano, kiu nomiĝis "Aĉa Grga".

Grgan ŝatis neniuj en la vilaĝo, ĉar li estis malbona. Sed kiam brulas ies domo, oni ne zorgas pri ŝatoj, sed necesas iri estingi la fajron.

Ĉiuj laboristoj kuris en la vilaĝon por helpi estingi la fajron. Ankaŭ Hlapiĉ kuris kun ili.

El ĉiuj domoj kuris multaj vilaĝanoj kaj ĉiuj portis longajn bastonojn kun kroĉilo por estingi per ili la fajron. Ankaŭ multaj virinoj kuris. Ĉiu virino portis tinon por estingi la fajron. Ankaŭ multaj infanoj kuris kaj ĉiu infano tenis antaŭtukon de sia patri-no kaj ploris. Ĉiuj kriis kaj kuris tra la mallumo al la fajro.

Tio estis malgranda vilaĝo kaj en ĝi ne ekzistis fajrobrigadistoj.

"Dio mia, kiel estingadi sen fajrobrigadistoj?", pensis Hlapiĉ, kiam ili alvenis al la fajro.

Sed en la vilaĝo la homoj estis tre saĝaj kaj ili kapablis estingi fajron ankaŭ sen fajrobrigadistoj. Ili ĉiuj viciĝis kiel soldatoj kaj la vico estis tiom longa, ke la unua vilaĝano staris apud puto, dum la lasta staris proksime de la fajro. La unua ĉe la puto rapide ĉerpis akvon kaj donis ĝin al la dua. La dua vilaĝano transdonis ĝin al la tria, la tria al la kvara kaj tiel ili rapide transdonadis la akvon unuj al la aliaj kaj la lasta troviĝis tute proksime de la fajro. Li staris sur ŝtupetaro kaj verŝis la akvon sur la brulantan stalon. Li estis tiom forta, ke li ĵetadis la akvon alten kiel fajrobrigadista ŝprucilo.

Tio okazadis ege rapide. Sed la homoj tamen kriadis unu al alia "Rapidu!" kaj la virinoj kriadis "Rapidu!", ĉar ĉiuj timis, ke ekbrulos ankaŭ la domo apud la stalo.

Sed sensukcese! Kiam ili estingis la fajron en la stalo, ekbrulis la domo apud la stalo, ĉar ĝi estis konstruita per lignobretetoj.

Dio mia, kiel terure, kiam brulas domo! Kiel kriis virinoj kaj infanoj, kiam sur la tegmento ekkraketis la fajro! La homoj jam estis lacaj kaj ekkverelis.

"Necesas grimpi sur la tegmenton kaj verŝi de supre", kriis iu.

"Mi ne iros sur tiun malnovan tegmenton, ke mi falu en la fajron", kriis alia.

"Vi estas malkuraĝulo!", kriis la tria.

Tiam ili tiom ekkverelis, ke la domo estus forbrulinta kaj eble eĉ iliaj ĉapoj ekbrulus antaŭ ol la kverelo ĉesus. Sed tiumo-

mente aŭdiĝis de la tegmento ies voĉo:

"Donu rapide al mi la akvon!"

Ĉiuj rigardis supren kaj vidis, ke sur la tegmento sidas iu en ruĝa ĉemizo, verda pantalono kaj brila ĉapo.

Nu tio estis Hlapiĉ, kiu grimpis sur la tegmenton, dum aliaj kverelis.

Nun la vilaĝanoj rapide komencis donadi al li akvotinojn unu post la alia per la bastonoj. Hlapiĉ rajdis sur la tegmentpinto kaj verŝadis la akvon kaj la fajro ĉiam pli kaj pli proksimiĝis al li. La flamo estis ĉiam pli granda kaj pli granda.

Virinoj kriis:

"Ve! Pereos tiu ĉi infano sur la tegmento!"

La flamo jam atingis preskaŭ la piedojn de Hlapiĉ, estis jam tre varme kaj li ankaŭ lacis, ĉar li jam multan akvon levis kaj liaj manoj tremis. La homoj sube ankaŭ tremis pro timo.

Hlapiĉ vidis, ke li ne povos estingi la fajron per akvo kaj ke la flamoj atingas jam liajn piedojn. Li apenaŭ povis spiri pro la varmego, kiu leviĝis de sur la tegmento.

"Donu al mi bastonon!", li kriis per mallaŭta voĉo, ĉar li ne plu povis paroli.

Homoj rapide etendis al li bastonon kun fera hoko.

Hlapiĉ batis forte, kiom li povis per la hoko la brulantajn bretojn sub siaj piedoj.

Pro tio la fajreroj flugis kiel steloj ĉirkaŭ Hlapiĉ kaj kiel grandaj serpentoj siblis la flamoj ĉirkaŭ li. Sed tiam aŭdiĝis eksplodoj kaj krakado. Brulantaj bretoj siblis tra la fajro kaj la tuta brulanta tegmentangulo falis surteren. La vilaĝanoj kriante alkuris kaj per bastonoj estingis la fajron.

Sur la domo nun ne plu estis flamoj: ĝi estis savita.

Sammomente - kia malfeliĉo! - malaperis Hlapiĉ de la teg-

mento. Li ne plu videblis.

Frakasiĝis la trabo, sur kiu Hlapiĉ sidis kaj li renversiĝis kaj falis de la tegmentpinto en la subtegmentejon.

Ho! Povra Hlapiĉ! Li estis tiom bona! Li volis helpi al ĉiuj kaj nun li falis de la tegmento kaj neniu sciis ĉu li estas vivanta aŭ morta.

GRANDA MIRAKLO

Tio, kio okazis al Hlapiĉ, kiam li falis de la tegmento, estis vera miraklo. Li devis esti vere bona, ĉar li ne nur tel mirakle saviĝis, sed li ankaŭ tre ĝojis.

Hlapiĉ do falis de la tegmento al la subtegmentejo. Sed jen miraklego! Li falis rekte en la keston plenan je faruno! Li falis en molaĵon kvazaŭ sur plumojn kaj nenio okazis al li.

Kaj kion vidis Hlapiĉ, kiam li rigardis tra la subtegmentejo, tio estis ankoraŭ pli granda miraklo kaj neniu povis diveni ĝin.

En la subtegmentejo pendis precize antaŭ Hlapiĉ liaj etaj, belaj botetoj.

Iom pli for pendis mantelo de la unua laboristo, pli for pendis hakilo de la dua laboristo, apud ĝi ŝinko de la tria laboristo. Tute en la angulo pendis sako de la kvara laboristo. Sur la planko troviĝis la blanka skatolo de Gita.

"Ho! Ho!", ekkriis Hlapiĉ sidante en faruno kvazaŭ muso en brano: "Ho! Ho! Homoj venu supren! Mi kaptis la botojn enaere!"

La homoj pensis, ke Hlapiĉ freneziĝis, kiam li falis de la tegmento, ĉar ili sciis, ke botojn oni ne kaptas enaere kiel papiliojn. Sed tamen ĉiuj alkuris al la subtegmentejo.

Kiam ili alvenis supren, ili trovis la subtegmentejon plenan je ŝtelistaj aferoj. La subtegmentejo estis tiom plena kiel iu vendejo. Nun ĉiuj sciis, kial Grga neniam nokte estas hejme. Ili sciis, ke Grga kaj la nigra homo estas amikoj kaj ke ili kaŝis la ŝtelistajn aferojn en la subtegmentejo de Grga.

La homoj estis tre feliĉaj, ĉiu prenis sian aferon kaj la plej ĝoja estis tiu, kiu trovis sian sakon kun mono.

Ili ĝoje salutis Hlapiĉ-on, blankan kiel flano el faruno, ili levis lin sur la ŝultrojn kaj forportis lin en la korton. Li tenis en la mano siajn karajn botetojn kaj estis feliĉa kiel imperiestro.

LA PATRINO DE GRGA

Nun ĉiuj estis kontentaj. Nur la maljuna patrino de Grga ploris en la lito. Ŝi ĝis nun ne sciis, ke ŝi havas tiom malbonan filon. Grga nun ne estis hejme, ĉar li nokte foriris pro sia aĉa laboro. Sed la patrino timis, ke la vilaĝanoj batos lin, se ili trovos lin. Ŝi aŭdis, kiel ili interparolis en la korto:

"Se Grga nun estus ĉi tie, ni tiel batus lin!", diris unu vilaĝano.

"Ni frakasmus lian kapon", diris alia.

"Ni ĵetus lin en la fajron", diris la tria.

Tiel minacis la vilaĝanoj.

"Tio ne estus saĝa", pensis Hlapiĉ "ĉar pro batoj Grga ne boniĝus.". Hlapiĉ eniris la ĉambron kaj diris al la patrino de Grga mallaŭte, ke la vilaĝanoj ne aŭdu lin:

"Ne ploru! Mi konas Grga, ĉar hieraŭ la laboristoj montris lin al mi, kiam li transiris la fojnherbejon. Se mi renkontos lin dum mia vojaĝo, mi diros al li, ke li ne iru en la vilaĝon. Mi

diros al li, ke li forlasu la nigran homon, foriru en la mondon kaj estu justa."

"Dio benu vin, kara infano!", diris al li la maljuna virino kaj ŝi tuj pli bone fartis, ĉar ŝi vidis, ke almenaŭ Hlapiĉ ne koleras je ŝia Grga.

Tiam ŝi donis al Hlapiĉ tukon. En la tuko estis arĝenta mono.

"Donu tion ĉi al mia Grga, se vi trovos lin", ŝi diris al Hlapiĉ kaj ŝi denove ekploris.

Hlapiĉ promesis al ŝi tion, prenis la tukon, adiaŭis ŝin kaj eliris al la korto.

Ne plu estis homoj en la korto. Ĉiu forportis sian aferon ĝoje hejmen. Hlapiĉ nun prenis la skatolon de Gita kaj forportis ĝin al Gita. Gita pro ĝojo tiom brakumis lin, ke Bundaŝ ekbojis pensante, ke ŝi sufokos Hlapiĉ-on.

Jam estis hela tago kaj neniu plu pensis pri la dormado.

CIKATRO DE GITA

Tiun tagon nenio plu okazis. Danke al Dio nenio plu okazis, ĉar ili ĉiuj estis tre lacaj. Tial oni ankaŭ ne tre multe laboris en la vilaĝo, oni nur multe interparoladis. Apud ĉiu barilo staris po du virinoj kaj interparolis pri la fajro. Sub ĉiu arbo kuŝis po tri aŭ kvar viroj kaj interparolis pri la fajro. Kaj en ĉiu fosaĵo ludis multaj infanoj. Sed la infanoj jam forgesis pri la fajro kaj ili kaptadis ranojn. Ĉiuj laŭdis Hlapiĉ-on pro lia heroeco ĉe la fajro.

Hlapiĉ havis vundon sur la kalkano. Bruligis lin la fajro, ĉar li estis nudpieda dum li estingis la fajron sur la tegmento. Gita bandaĝis la vundon de Hlapiĉ kaj li diris:

"Mi tre ĝojas, ke la nigra homo ŝtelis miajn botetojn."

"Kial vi ĝojas pri tio?", demandis Gita.

"Ĉar se mi kun la botetoj estintus en la fajro, ili nun havus truon en la kalkanumo. Tio estus bedaŭrinda. Mia vundo ne gravas, ĉar ĝi baldaŭ resaniĝos."

Gita miris, ke Hlapiĉ tiom malmulte zorgis pri sia vundo. Ŝi certe plorus dum tri tagoj, se ŝi havus tian vundon.

Tamen ankaŭ ŝi volis laŭdi sin kaj ŝi montris sian dikfingron sur la dekstra mano.

"Vidu, mi ankaŭ havis ĉi tie vundon", ŝi diris.

Kaj vere rekoneblis sur la dikfingro de Gita cikatro. La cikatro similis al kruco.

"Kiam vi havis tiun vundon?", demandis Hlapiĉ "Ĉu ĝi tre doloris?"

"Mi ne rememoras, kiam mi havis ĝin. Mi ankoraŭ estis tre malgranda. Tio estis antaŭ ol mi venis al mia mastro en la cirko."

"Kaj de kie vi venis al via mastro?"

"Ankaŭ tion mi ne scias", diris Gita.

"Sed kiu kondukis vin tien?"

"Ankaŭ tion mi ne scias. La mastro diras, ke mi havas nek patron nek patrinon", diris Gita "kaj mi preferus ne havi ankaŭ lin, ĉar mi ne ŝatas lin. Liaj okuloj estas tre malbelaj. Iufoje meze de la nokto mi aŭdis lin kun iuj homoj flustradi. Li certe estas malbona homo."

Gita iom enpeniĝis kaj diris:

"Mi ege ŝatus havi patrinon. Kiajn sentojn oni havas, se oni havas patrinon, Hlapiĉ?"

"Tion mi ankaŭ ne scias", respondis Hlapiĉ "ĉar mi ne havas patrinon. Sed mi havis majstrinon, kiu ofte defendis min de la

majstro. Kaj se mi vespere estis dormema, ŝi prenis balailon el miaj manoj kaj balais la laborejon anstataŭ mi. Tiel verŝajne estas ĉiam por tiuj, kiuj havas patrinon."

"Tiam mi ege ŝatus, ke via majstrino estu mia panjo", diris Gita.

Hlapiĉ volis klarigi al ŝi, ke tio neniel estas farebla, sed li ne havis tempon, ĉar la vilaĝanoj bakis ŝafidon sur stangrostilo je la gloro de Hlapiĉ kaj li iris turni la stangrostilon.

Vespere ili ĉiuj estis tre ĝojaj, ili manĝis kukon kaj bakitan viandon kaj ili diris al Hlapiĉ, ke li restu ankoraŭ unu nokton ĉe ili ĝis la vundo iom pli saniĝos.

LA KVINA VOJAĜTAGO

LA PAŝTADO

Por Hlapiĉ kaj Gita estis malfacile la postan tagon foriri for de la vilaĝanoj, ĉar ili tiom ekŝatis la duopon kvazaŭ ili estus vivintaj tie dum almenaŭ tri jaroj. Pro tio, ĉar ili kune estingis la fajron. Tiel estas ĉiam, kiam homoj kune travivas grandan mizeron.

Gita kaj Hlapiĉ estis do tre malgajaj forirante kaj ju pli ili malgajis des pli la vilaĝanoj plenigis la sakon de Hlapiĉ per viandrostajoj, pano kaj kukoj, ĉar ili ne sciis kiel alimaniere konsoli la duopon. Finfine la sako de Hlapiĉ estis tiom dika kiel granda burdo post kiam ĝi satrinkis mielon.

Gita ekridis, kiam ŝi vidis tiom plenigitan sakon kaj finfine feliĉaj ili ekvojaĝis.

La strato kuŝis inter grandaj kaj verdaj herbejoj kvazaŭ longa pajlo super verda maro. Hlapiĉ kaj Gita iris sur la strato kvazaŭ du formikoj sur pajlo.

Post longa irado ili venis al iu loko, kie la strato dispartiĝis je du stratoj. Unu plukondukis tra la granda ebenaĵo, dum la alia ascendis sur montojn kaj en arbaron. Tia loko nomiĝas vojkruciĝo.

Homoj rakontas, ke ĉe tiaj vojkruciĝoj dum antikvaj tempoj renkontiĝis feoj, sorĉistinoj kaj ogroj. Sed nun tio ne plu okazas. Somere ĉe vojkruciĝoj sidas paŝtistetoj kaj ili tranĉas bastonojn aŭ skuas blankajn kaj nigrajn morusojn. Vintre sub la lunlumo kaj surneĝe ĉe vojkruciĝo ludas dumnokte leporoj.

Nun estis somero kaj sur iu herbejeto apud la vojkruciĝo

estis multaj paŝtistetoj kaj paŝtistinetoj, kiuj paŝtis bovinojn kaj bakis maizojn.

La paŝtistetoj estis kvin: du knabinoj kaj tri knaboj.

La plej eta paŝtisto estis ankoraŭ tiom malgranda, ke ĉiu pli alta herbo tiklis lin ĉe la nazo kaj li surhavis nur ĉemizeton, kiu pendatingis la teron. Li estis tiom eta kaj dika, ke Hlapiĉ jam el malproksimo divenis, ke li nomiĝas Miŝko.

Ĉiuj paŝtistoj ĉirkaŭis Hlapiĉ-on, Gita-n sed ankaŭ Bundaŝ-on kaj la papagon kaj ili ne sciis, kiaj buntaj stranguloj alvenis. Ili demandis tion kaj jenon kaj la eta Miŝko rememoris, ke en la vilaĝo foje estis kapitano en soldatuniformo. Tial li fingromontris al Hlapiĉ kaj diris:

"Ankaŭ tio ĉi estas kapitano. Sed kiam ĉi tiu kapitano kreskos, lia ĉapo estos tro malgranda."

Tio kolerigis Hlapiĉ-on, ĉar li ne ŝatis, se oni konstatis, ke li estas malgranda. - Tial li diris al Miŝko montrante ties longan ĉemizeton:

"Kiam vi kreskos, vi povos en tiu ĉi blanka talaro iĝi monaĥo. Ĝi estos ankoraŭ sufiĉe longa."

Sed nun enmiksiĝis pli aĝa frato de Miŝko kaj diris al Hlapiĉ:

"Vi ne insultu mian fraton!"

"Mi ne insultas, mi nur ŝercumas", respondis Hlapiĉ.

Tiam la frato de Miŝko eliris rekte al Hlapiĉ, okulmezuris lin kaj diris:

"Tio ne estas ŝerco, vi ne kverelu kun mia frato."

Hlapiĉ jam de longe estis metilernanto kaj li sciis, ke kiam ajn knaboj tiel parolas, ili volas lukti.

Sed Hlapiĉ ne luktemis, kvankam li estis pli granda ol ĉiuj paŝtistetoj.

Tial li diris al la frato de Miŝko:

"Ni ne batalos, sed ni ĵetos ŝtonojn kaj tiel ni vidos, kiu estas pli forta!"

Hlapiĉ levis de la strato grandan ŝtonon kaj metis ĝin sur ŝultron kvazaŭ ĝi estus plumo. Tiam li svingis perŝultre kaj forĵetis la ŝtonon. La ŝtono forflugis malproksimen kaj alten super branĉoj kaj vergoj foren sur la herbejon.

Tiel lerte ĵetadis ŝtonojn verŝajne nur la reĝido Marko, dum li ankoraŭ estis malgranda. Neniu paŝtisto povis tiom malproksimen ĵeti ŝtonojn.

Nun la frato de Miŝko eksilentis kaj li ĝojis, ke Hlapiĉ ne ekbatalis kun li. Kaj la knabinoj, kiuj ĉiukaze malvolonte rigardas, ke knaboj batalas, diris:

"Tiu ĉi estas kaj pli forta kaj pli saĝa ol la frato de Miŝko."

Gita foriris kun la paŝtistoj malsupren al la herbejo, kie maizoj estis metitaj sur lignardaĵon.

"Kiel bele kraketas la maizoj!", krietis Gita. "Ni restu iom ĉi tie!"

Hlapiĉ ne malŝatis resti, ĉar la paŝtistoj admiris lin kaj li tamen ŝatis tion. Krome estis sur la herbejo tre bele.

Kiel bele estas al malgrandaj paŝtistoj sidi sur herbejo apud fajro kaj baki sur ardaĵo maizojn aŭ sub cindro terpomojn, tio etas entute malfacile klarigebla. Sed estas ankaŭ pli bone, ke pri tio oni ne skribu. Al ĉiuj homoj ne estas tiom bele, kiom estas al malgrandaj paŝtistoj kaj multaj bedaŭrus, dum ili legus, ke al aliaj estas pli bele.

Kiam Gita kaj Hlapiĉ venis kun la paŝtistoj al la fajro, neces trovi pli da maizoj, ĉar nun ili estis pli multaj.

"Kaj ĉu oni rajtas ŝiri maizon?", demandis Hlapiĉ.

"Ni rajtas, ĉar ni protektas ĝin", diris la paŝtistoj.

"Kiel vi protektas ĝin, se vi ŝiras ĝin?", demandis Gita.

"Ni protektas ĝin de bovinoj. Se ni ne estus, ne ekzistus maizo", diris fiere iu sufiĉe granda paŝtisto.

"Tio ne ĝustas", diris Hlapiĉ. "Mi lernis en metia lernejo: Se ne estus Sinjoro Dio, ne ekzistus maizoj."

"Sed tion ĉiuj scias", ekridis ĉiuj paŝtistoj samtempe.

"Unue Dio devas doni la maizojn kaj tiam ni protektos ilin."

"Kiamaniere vi scias, ke Dio donas maizon kaj ĉion alian, se vi ne iris en lernejon?", demandis Hlapiĉ.

"Ni ĉiutage iradas tra kampoj kaj herbejoj kaj ni vidas, ke herboj ĉiutage estas pli grandaj kaj maizoj pli densaj. Pro tio ni scias, ke tion neniuj povus fari krom Dio", diris la plej aĝa paŝtisto.

Pri tio Hlapiĉ sufiĉe miris, ĉar li ne sciis, ke de herboj kaj maizoj homoj povus multon lerni kaj ke el kampoj kaj herbejoj venis saĝo en lernejajn librojn de Hlapiĉ kaj en ĉiujn aliajn librojn.

Tiam ĉiuj iris ŝiri maizspikojn. Hlapiĉ demetis la botojn por ne malbeligi ilin, ĉar la herboj sur la herbejo estis humidaj.

Sed li tuj rimarkis, ke Miŝko rigardas la botojn. Tial li diris al Miŝko:

"Ne tuŝu la botojn, Miŝko! Tio estas imperiestraj botoj kaj ili mordos vin, se vi surpiedigos ilin."

Unu el la paŝtistoj aldonis:

"Kompreneble ili mordos" - kaj li metis en ĉiun boton kelkajn urtikojn tiel, ke Miŝko ne rimarkis.

Poste ĉiuj foriris krom Miŝko.

Kiam Miŝko restis sola, li longe rigardis la botojn. Ŝajnis al li, ke ili estas ĉiam pli belaj. Finfine li ne povis kredi, ke ili mordas.

Tial li ekiris malrapide al la botoj. Miŝko estis saĝa. Mal-

rapide kaj atenteme li ŝovis la manon en unu boton.

"Ho ve!" li ekkriis, kiam la urtikoj dolorigis lin, "ili vere mordas."

Kaj li enpensiĝis.

La eta paŝtisto bone konis urtikojn kaj li baldaŭ komprenis, kio troviĝas en la botoj. Tiam li volvis sian manon per ĉemizeto kaj elprenis ĉiujn urtikojn unu post la alia.

Kiam la paŝtistoj kun Hlapiĉ kaj Gita revenis, renkonten al ili venis Miŝko kaj sur liaj piedoj estis la botoj de Hlapiĉ. Ili atingis lian talion kaj li estis tiom ridinda en ili, ke eĉ Hlapiĉ ne koleriĝis.

"Kio estas, Miŝko? Ĉu ne mordas vin la botoj?", demandis Hlapiĉ.

"Ili mordis sed mi elprenis iliajn dentojn", respondis Miŝko.

Ĉiuj ridis pri Miŝko. Tiam Miŝko formetis la botojn kaj redonis ilin al Hlapiĉ, kiu denove surmetis ilin. Kaj ili ambaŭ estis kontentaj.

Se ĉiuj homoj estus tiom bonaj kiom Hlapiĉ, ofte povus du homoj esti feliĉaj havante nur unu paron da botoj.

Tiam sidiĝis ĉiuj ĉirkaŭ la fajro. La knabinoj swingis per antaŭtukoj, ke la fajro ekbrulu kaj la knaboj surpikis la maizspikojn sur longajn vergojn por baki ilin.

Hlapiĉ sidis kaj rakontis pri la majstro Mrkonja, pri la nigra homo kaj pri aĉa Grga.

"Nun mia plej granda zorgo estas trovi Grga kaj transdoni al li la tukon kaj forinton de lia patrino", diris Hlapiĉ.

"Sed kie vi trovos lin?" demandis Gita.

"Tion mi ne scias! Sed mi tiomege deziras doni tion al li, tion kion lia patrino sendis al li, ke mi komencas kredi, ke Grga eble subite aperos antaŭ mi."

"Tiel certe ne estos", ekridis la plej aĝa paŝtisto. Eĉ piro ne povas fali antaŭ vin, se vi ne troviĝas sub pirarbo kaj des malpli eblas, ke homo subite aperu antaŭ vi."

KIEL APERIS HOMO APUD HLAPIĈ

Tuj post kiam la paŝtisto tion diris, aŭdiĝis laŭta bruego de la strato, kiu ascendis al la montoj. Io rapidegis kaj ruliĝis sur la vojo.

Aŭdeblis kriado kaj sakrado.

Hlapiĉ kaj ĉiuj aliaj rigardis al la strato.

De la monto rapidegis laŭ la strato ĉaro. La ĉevaloj estis timigitaj kaj ili rapidege kuris.

Ili suprenigis la kapojn kaj disŝetadis ĉirkaŭ si ŝaŭmon, kva-zaŭ ili havus rabion. La ĉaro ruliĝis kaj balanciĝis de unu flanko al la alia kiel balancilo.

Ŝajnis, ke tuj ĝi renversiĝos en la apudstratan fosaĵon.

En la ĉaro sidis du homoj kun terurigitaj vizaĝoj. Unu el ili tiris al si bridilon. La alia bridilo ŝiriĝis kaj batadis la ĉevalojn, kiuj ĉiam pli freneze rapidegis.

"Hoj!", ekkriis Hlapiĉ "ni haltigu la ĉaron!"

Kaj li kuris al la strato, stariĝis vojmeze, alte levis ambaŭ brakojn kriante plenvoĉe kaj swingante la brakojn. Hlapiĉ plurfoje vidis, ke oni tiel haltigas timigitajn ĉevalojn.

La ĉaro estis ankoraŭ malproksime. Sed estis tamen danĝere vidi, kiel ĝi rapidegas rekte al Hlapiĉ.

Sed antaŭ ol atingi Hlapiĉ-on, balanciĝis la ĉaro, frapis per unu rado ŝtonon apud la strato kaj renversiĝegis.

La ĉevaloj rigidiĝis kiel du turoj kaj sammomente el la ĉaro

estis elĵetitaj du homoj. Ili ruliĝis rekte en la fosaĵon apud Hlapiĉ.

"Oho!", kriis Gita kaj ĉiuj paŝtistetoj kiuj alkuris al la strato.

Kaj la ĉevaloj, kiuj spiradis kiel du fajrodraĵoj - haltis subitege, pro kio la ĉaro renversiĝis.

"Ho! Ho!", alsaltis Gita kaj kaptis la bridilojn de la ĉevaloj "Kiom bela estas tiu ĉi ĉevaleto! Ni maljingu ĝin. Mi ŝatus rajdi! Ho, tiu ĉevalo estas preskaŭ tiom bela kiom mia Soko!"

Ŝi nome ekmemoris pri sia ĉevalo en la cirko kaj tio tiom ĝojigis ŝin, ke ŝi ne plu pensis pri io ajn alia. Tio ofte okazas al knabinoj.

Sed Hlapiĉ sciis, ke nun ili havas pli seriozan taskon. Tial li lasis la ĉevalojn al Gita kaj la paŝtistoj kaj li iris al la fosaĵo por kontroli, kio okazis al la du homoj, kiuj falis de la ĉaro.

Se Hlapiĉ estus sciinta, kia surprizo atendas lin, li iom pri-pensus, kion fari. Sed tiukaze kompreneble ne temus pri surprizo.

En la fosaĵo nome kuŝis - Dio mia, tamen timiĝis la koro de Hlapiĉ! - en la fosaĵo kuŝis la nigra homo kaj Aĉa Grga kaj ili ĵus ekstaris, kiam Hlapiĉ atingis ilin.

Ĉar li ne sciis, kion fari nun, Hlapiĉ diris tion, kion ĉiam eblas diri.

"Bonan tagon!"

"Estas vere bona tago! Ĉu tial, ke ni renversiĝis?", demandis la nigra homo el la truo per tiom profunda voĉo kvazaŭ li parolus el tombo.

"Bona estas la tago, ĉar vi restis vivaj", respondis Hlapiĉ laŭte. Kaj tuj li pensis en si mem: "La tago estas bona ankaŭ pro tio, ke nun mi povos al Grga doni la tukon kaj la forinton."

Poste Hlapiĉ ekpensis: "Kio okazos, kiam nigra homo rimar-

kos, ke mi trovis miajn botojn."

Sed la nigra homo eĉ ne rigardis Hlapiĉ-on pro urĝemo. Tuj kiam li ekstaris, li kolere kriis al Grga:

"Kial vi sidas? Niaj brakoj kaj kruroj ne rompiĝis kaj por parolado ni ne havas tempon. Ni rigardu, kio okazis al la ĉevaloj."

Videblis, ke li tre urĝemas. Do la nigra homo kaj Grga eliris el la fosaĵo kaj ekiris al la ĉaro.

Sed nun Bundaŝ rekonis la nigran homon. Kvazaŭ furioza li ekgrincis, saltis kontraŭ li kaj kaptis lian nigran pluvmantelon.

La nigra homo puŝis Bundaŝ-on piede sed turninte sin al li li diris:

"Oho! Vin mi jam foje aŭdis ie grinci!"

Apud Bundaŝ staris Hlapiĉ.

La nigra homo nun rimarkis kaj rekonis Hlapiĉ-on kaj... li-ajn botojn.

Dum momento li staris senmove. Videblis, ke ĉiaj nigraj pensoj trairas lian nigran kapon.

Li rigardis Hlapiĉ-on, kiel akcipitro rigardas sian kaptaĵon.

Hlapiĉ, kvankam malgranda, staris rekta kiel kandelo kaj rigardis rekte en la okulojn de la nigra homo kaj pensis:

"Okazu kio ajn sed miajn botojn li ne ricevos dum mi vivas!"

Kaj Bundaŝ montris siajn flankajn dentojn pensante: "Ne tuŝu mian Hlapiĉ-on!"

Ŝajnis, ke nun okazos malbono.

Sed tio daŭris nur momenton kaj la nigra homo murmuris:

"Ni ne havas tempon!", li tuj kriis al Grga, kiu staris apud la ĉevaloj:

"Jungu la ĉevalojn, vi malfeliĉulo!"

"La bridiloj estas ŝiritaj", respondis malbonhumore Grga "ni

ne povas daŭrigi la vojaĝon."

"Ni devas daŭrigi!", kolere kriis la nigra homo kaj kaptis la bridilojn por vidi, kio okazis al ili.

Nun okazis io, pri kio la nigra homo tute ne esperis.

Hlapiĉ nome aliris lin kaj diris:

"Mi riparos la bridilojn."

"Vi, botvestita kato, kiel vi kunkudros la bridilojn?", koleris la nigra homo kaj okulmezuris Hlapiĉ-on de botoj ĝis la ĉapo.

"Botvestita mi estas, kvankam mi dum du tagoj estis nudpieda", respondis Hlapiĉ" sed kato mi ne estas. Se mi estus kato, mi ne kapablus kudri, sed mi estas metilernanto Hlapiĉ, mi portas en mia sako alenon kaj fadenojn kaj mi kunkudros viajn bridilojn, ĉar mi vidas, ke vi devas rapidi."

Tio vere estis ĝentila, ĉar ekzistas malmultaj homoj, kiuj kunkudrus la bridilojn de tiu, kiu ŝtelis ties botojn.

Hlapiĉ demetis sian sakon de la ŝultro, elprenis el ĝi la alenon, la fadenojn kaj iom da ledo.

Tiam li alpaŝis la ĉevalojn kaj komencis depreni la bridilojn kaj rimenojn.

Vidinte ke Hlapiĉ serioze eklaboras, la nigra homo diris:

"Nu, bona vi estas. Kudru rapide kaj ni elviŝos el la memoro, kio okazis pri la botoj."

"Mi ĉiukaze pli volonte havas la botojn sur piedoj ol en memoro", respondis Hlapiĉ.

Tiam li sidiĝis sur ŝtonon apud la vojo kaj ekkudris la bridilojn.

Estas vera miraklo, kiel ĝojiga estas la ŝufarista metio! Tuj post kiam Hlapiĉ ekpikis per la aleno li eltiris la fadenojn kaj li tuj ekkantis kaj ekfajfis kiel en la laborejo de la majstro Mrkonja!

Li preskaŭ forgesis, ke li devas serioze interparoli kun Grga. Grga nun sidiĝis ĉe Hlapiĉ por helpi al li labori kaj la nigra homo foriris ripari la ĉaron.

Gita kaj la paŝtistetoj kondukis la ĉevalojn al la herbejo paŝtiĝi.

GRGA KAJ HLAPIĈ

Kiam Grga kaj Hlapiĉ restis solaj, diris Hlapiĉ mallaŭte al Grga:

"Grga, mi bone riparos la bridilojn kaj vi veturigu foren, ne reiru en la vilaĝon. Tie atendas la vilaĝanoj por mortigi vin."

Grga silentis kaj rigardis la botojn de Hlapiĉ. Laŭ tiuj botoj sciis Grga, ke la vilaĝanoj nun scias, ke li ŝteladis kun la nigra homo.

"Grga", denove diris Hlapiĉ "via patrino sendis al vi ion: Mi ne donos tion al vi antaŭ ol vi promesos al mi ion."

"Kian promeson vi volas?", demandis mallaŭte Grga.

"Promesu al mi, ke vi forlasos la nigran homon kaj ke vi foriros malproksimen en la mondon. Tie restu sola kaj estu justa. Tion mesaĝis al vi via malsana patrino kaj ŝi ploris, kiam ŝi donis tion ĉi por vi."

Tiam Hlapiĉ elprenis el la sako la tukon, en kiu estis envolvita la forinto kaj li donis ĝin al Grga.

Kiam Grga vidis la tukon de sia patrino kaj kiam li aŭdis, kion ŝi mesaĝis al li, li bedaŭris kiel eta infano. Ofte, kiam grandaj homoj rememoras pri sia patrino, ili sentas varmon en la koro kiel etaj infanoj.

Sed Grga ne sukcesis multon respondi al Hlapiĉ, ĉar jam revenis la nigra homo. Grga rapide metis la tukon kun la forinto en la poŝon kaj flustris al Hlapiĉ:

"Kunkudru bone la bridilojn kaj dankon, bona Hlapiĉ!"

Tiam venis la nigra homo.

"Finite!", diris Hlapiĉ, kiu ĵus finis la laboron pri bridiloj.

"Ĉi tien la ĉevalojn! Rapide!", kriis la nigra homo.

La paŝtistetoj kaj Gita alkondukis la ĉevalojn.

Unu el la ĉevaloj estis nigra kiel korvo kaj brila kiel suno. Ĝi havis longajn kolharojn kaj la voston. Vera nigrulo!

Dio scias ĉu mi iam revidos tiun ĉi ĉevaleton", eksopiris Gita, kiam la ĉevaloj jam estis aljungitaj.

"Fakte vi ne revidos ĝin, akridino!", diris la nigra homo. "Tien kien ĉi tiu ĉevalo iras, vi neniam venos. Ni rapidu! Ne parolu!"

Ĉio estis preta.

La nigra homo saltis en la ĉaron kaj apud li sidiĝis Grga.

Hlapiĉ rigardis Grgan kaj ŝajnis al li, ke li malgajis.

"Tio estas bona", pensis Hlapiĉ "kiu kapablas malgaji tiu ankaŭ povas esti bona!"

La nigra homo batis la nigrulon kaj la ĉevaloj ekkuris kvazaŭ sagoj sur la rekta strato.

Hlapiĉ, Gita kaj paŝtistoj postrigardis ilin. Iu paŝtisto diris:

"Ili tiom rapidas, kvazaŭ ili pri io kulpus."

"Ili ja rapidu", respondis Hlapiĉ. "Mi malvolonte denove renkontus la nigran homon."

"Kiel vi povus denove renkonti lin, se vi mem diris, ke tiu ĉi lando estas granda?", demandis Gita.

"Kiam mi ekserĉis miajn botojn, ĝi ŝajnis al mi granda kiel sep imperioj - kaj nun, kiam mi timas, ke mi renkontos la nigran homon, ĝi ŝajnas malgranda kaj malvasta kiel korno!", respon-

dis Hlapiĉ.

Tiam ili sidiĝis ĉiuj ĉirkaŭ la fajro.

Hlapiĉ elprenis la viandon kaj la kukojn kaj ĉar ili sepope sidis ĉirkaŭ la fajro, la sako de Hlapiĉ baldaŭ malpleniĝis. Nun ĝi ne plu aspektis kiel burdo sed ĝi estis maldika kaj plata kiel tripaĝa libro.

NOKTO MALANTAŬ LA FORNO

La paŝtistetoj kaj Hlapiĉ kun Gita longe parolis pri ĉio, kio okazis kaj jam ekkrepuskiis kaj estis tempo iri hejmen kun la bovinoj.

Sed ili tiel arde interparolis kaj nur rigardis la fajron, ke ili tute ne rimarkis, kiam la suno subeniris kaj ili forgesis hejmeniri kun la bovinoj.

La plej granda blanka bovino, kiu paŝtis sin apud ili, proksimiĝis al eta Miŝko kaj mallaŭte lekis lian nudan krureton:

"Ni iru hejmen, Miŝko", tion volis diri la bovino.

Kaj vere! Miŝko levis la kapon kaj rimarkis, ke la suno mal-supreniris.

"Hoj! Jam malhelas!", li ekkriis.

Ankaŭ ĉiuj aliaj levis la kapojn kaj vidis, ke estas tempo hejmeniri kaj ili rapide kunkolektis la bovinojn.

Gita demandis Hlapiĉ-on:

"Sed kien ni iros?"

Tion ankaŭ Hlapiĉ ne sciis. Estis tro malfrue por daŭrigi la vojaĝon kaj ili ne havis tranoktejon.

Nun Hlapiĉ havis problemon.

Sed Gita rememoris, kion ŝi hodiaŭ vidis.

Ŝi nun sciis, ke Hlapiĉ kunhavas alenon kaj fadenojn kun si kaj ke tio estas granda trezoro.

"Proponu al la paŝtistoj, ke vi hejme riparos iliajn opankojn kaj ili akceptos nin por tranokti", diris Gita.

Hlapiĉ ekhontis, ke li sen Gita ne memoris, ke li povus satigi sin per la propra metio.

La paŝtistoj promesis, ke ili akceptos ilin en sia tranoktejo kaj tiel ili ĉiuj ekiris al la vilaĝo, kiu ne estis malproksima.

La bovinoj kun sonoriloj iris antaŭe!

La bovinojn sekvis Bundaŝ, kiu pelis ilin kvazaŭ iu paŝtista hundo. Kaj post Bundaŝ sekvis kvin paŝtistetoj kaj Hlapiĉ kaj Gita.

Hlapiĉ portis surŝultre la papagon de Gita, kun kiu li jam amikiĝis. La papago tiutage tiom ofte aŭdis la nomon "Grga", ke ĝi restis sur ĝia lango. Ĉar papagoj portas sian scion sur la lango kaj ne en la kapo. Kiam ili do alvenis en la vilaĝon, kriadis la papago al ĉiu vilaĝano, kiun ili renkontis:

"Bonan vesperon, Grga!"

Pri tio kompreneble ĉiu ridis. Tiu, kiu nomiĝis Grga, samkiel tiu, kiu ne nomiĝis Grga.

Tiel la tuta vilaĝo samvespere sciis pri Hlapiĉ kaj Gita.

Hlapiĉ kaj Gita eniris post la bovinoj kun Miŝko kaj lia frato en iun korton.

Hlapiĉ promesis al la gepatroj de Miŝko, ke li matene riparos ĉiujn opankojn en la domo kaj ili akceptis lin kaj Gita-n por tranokto. Sed tion ili ĉiukaze estus farintaj, ĉar la vilaĝanoj estas bonkoraj al malriĉaj infanoj.

Post la vespermanĝo ili foriris dormi.

La infanoj dormis en angulo malantaŭ la forno. La loko estis

vasta kaj granda. Vintre ĝi varmigas kaj somere malvarmigas. Kvankam ili nun estis kvarope, ili tamen dolĉe dormis.

Nur la papago de Gita devis esti fermita en la korbo, kiu pendis super la forno sur la trabo.

"Tiu verda strigo havas malrektan nazon kiel sorĉistino", diris Miŝko. Ĝi povus nokte elbeki niajn korojn."

Kaj la avino, kiu dormis sur la lito rigardis la papagon de-flanke. Ankaŭ al ŝi ŝajnis, ke tio povus okazi. La avino kaj Miŝko nome ĉiam samopiniis kaj tial la papago devis esti metita en kovritan korbon kaj sur la trabon.

Tiam ĉiuj endormiĝis.

Antaŭ ol Hlapiĉ endormiĝis li kalkulis enkafe, kiom for li troviĝas de majstro Mrkonja.

Tiam li elkalkulis, ke li ne estas tre for kaj ke Mrkonja en unu tago povus pasi ĉi tiun distancon, kiun li trairis dum kvin tagoj. Tio estis, ĉar kun Gita ne eblis rapide vojaĝi. Sed por Hlapiĉ estis malfacile eĉ pensi pri tio, ke li disiĝus de Gita kaj ke li restus denove sola kun Bundaŝ survoje.

Li kontentis pri tio, ke ili ankoraŭ ne trovis la mastron de Gita kaj la cirkon, kvankam Gita vojaĝis por ke ŝi trovu lin.

Tiel pensis Hlapiĉ en la fornangulo. Li kompreneble pro tio ekhavis zorgojn. Sed tiam li ekpensis:

"Zorgoj venas kaj foriras de si mem. Ne utilas pripensi! Grga falis de si mem antaŭ mi en la fosaĵon. Se mi dek jarojn estus pensadanta kiel trovi lin kaj transdoni al li la tukon, mi ne elpensus tion."

Kaj tiam Hlapiĉ endormiĝis.

En la ĉambro jam ĉiuj dolĉe dormis.

Kaj plej dolĉe dormis Miŝko kaj la avino, kvankam ili pensis, ke sorĉistino troviĝas en la korbo sur la trabo.

LA SESA VOJAĜTAGO

ETA ŜUFARISTO KAJ ALMOZULINO JANA

Kun la unuaj sunradioj ekstaris Hlapiĉ el la fornangulo, ĉar li sciis, ke atendas lin la laboro. Sed la gepatroj de Miŝko jam foriris al la kampo labori. Neniu povas ellitiĝi tiom frue kiel vilaĝanoj.

Hlapiĉ malsupreniris el la fornangulo, aplaŭdis kaj kriis al la infanoj:

"Opankojn ĉi tien, vekigu ĉiuj!"

La infanoj malsupreniris el la fornangulo. Ĉiuj estis taŭzigitaj kaj varmaj kvazaŭ birdetoj elirintaj el nesto.

Baldaŭ kuŝis antaŭ Hlapiĉ opankamaso.

"Necesas multe labori", pensis Hlapiĉ.

La suno leviĝis. Antaŭ la domo en la ombro elektis lokon Hlapiĉ por sia laboro.

Kiam li eklaboris, li ne plu pensis pri io ajn alia ol pri sia laboro.

Gita ne volonte rigardis, kie oni ion seriozan faris kaj ŝi tial tuj forlasis Hlapiĉ-on kaj foriris kun la vilaĝknabinoj transaltadi tolaĵojn, kiujn blankigis virinoj sur la herboj. Kompreneble, ke Gita saltadis pli bone ol aliaj knabinoj, ĉar en la cirko ŝi ĉiukaze faris nenion alian! Ŝi transsaltis tri tolaĵvicojn kaj falis sur tolaĵojn de najbarino. Sed feliĉe la najbarino ne estis hejme por vidi tion.

Hlapiĉ do laboris kaj Gita ludis.

La vilaĝon trapasis almozulino Jana.

Kiam ŝi atingis Hlapiĉ-on, ŝi ekmiris pri la eta opankisto

havanta altajn botojn, kiu eklaboris en la vilaĝo.

Tiam demandis la almozulino:

"Ĉu vi volas ripari ankaŭ opankojn de maljuna povrulino?"

"Certe jes, min ĉiukaze sendis la imperiestro, ke mi iru tra tiu ĉi lando kaj kie bezonatas helpo, mi helpu", respondis Hlapiĉ.

"Se estas tiel, necesus, ke pli da tiaj iradu tra tiu ĉi lando", respondis la almozulino.

"Oni serĉis pli da volontuloj, sed neniu volis iri krom la metilernanto Hlapiĉ. Kaj tiu estas mi."

Kompreneble, ĉio tio estis malvero. Sed ĝi ŝajnis vera kaj la maljuna almozulino ekridis.

Tiam Hlapiĉ ekriparis opankojn de maljuna Jana.

Jana sidis kaj rakontis al Hlapiĉ ĉion, kio okazis en tri vilaĝoj, ĉar ŝi iris de vilaĝo al vilaĝo.

"Fileto, vojaĝu nur dumtage", diris Jana, kiam ŝi aŭdis, ke li ankoraŭ hodiaŭ intencas daŭrigi la vojaĝon. "Pasintnokte okazis akcidento en arbaro malantaŭ la vilaĝo. Estis prirabita homo, kiu per ĉaro kaj kun varoj veturis al foiro. Neniu scias, ĉu tiu homo vivas aŭ mortis kaj la malbonuloj fuĝis en la ĉaro."

Tio ne plaĉis al Hlapiĉ. Ĉiu, kiu vojaĝas nur malvolonte aŭdas, ke al iu vojaĝanto okazis malbono. Sed tiel rakontis maljuna Jana. Kaj ĉio, kion Jana rakontis estis vero, ĉar ŝi ĉie trapasis kaj ĉion sciis.

EN LA FOIRO

Kiam pasis la tagmezo, Hlapiĉ diris al Gita:

"Estas tempo foriri. Estas ankoraŭ longa vojo antaŭ ni. Ni devas serĉi vian mastron."

"Hlapiĉ", diris Gita "Mi ŝanĝis la opinion: Mi ne plu volas iri al mia mastro."

Kiam Hlapiĉ tion aŭdis, li ĝojis kiel ankoraŭ neniam dum tiu ĉi vojaĝo. Li sciis, ke tio por li estos pli granda zorgo, sed almenaŭ li ne estos sola dum sia vojaĝo.

Tiam Gita kaj Hlapiĉ adiaŭis de Miŝko kaj lia frato kaj dankis al iliaj gepatroj kaj ili pluvojaĝis.

Ili iris bone kaj rapide kaj baldaŭ alvenis en grandan urbon.

Tiu ĉi urbo estis tiom granda, ke ĝi havis grandan preĝejon kun du turoj kaj dek malgrandajn preĝejojn kun unu turo. Estis en tiu urbo cent stratoj kaj en ĉiu strato svarmis homoj kvazaŭ formikoj. Ĉiu strato havis kvar angulojn kaj ĉe ĉiu angulo staris du gardistoj.

Tiel granda estis tiu ĉi urbo.

Tamen Hlapiĉ kaj Gita ne devis trairi ĉiujn cent stratojn sed nur unu nuran, ĉar ili tuj alvenis al tre granda placo.

Sur ĉi tiu placo estis foiro.

En la foiro estis ducent tendoj grandaj kaj malgrandaj. Vendataj estis ruĝaj tukoj kaj nigraj manteloj, bluaj potoj kaj flavaj melonoj.

Batadis tamburoj kaj fajfis fajfiloj, ĉar estis ankaŭ vendataj multaj ludiloj.

"Ho! Kiel ĉi tie ĉio estas bela kaj ĉiuj gajaj!", diris Gita "Ni restu iom ĉi tie!"

"Jen vidu!", pensis Hlapiĉ. "Mi sciis, ke ŝi tion diros, kiam ŝi vidos la foiron."

Li ne volis ofendi Gitan kaj li laŭte diris:

"Ne estus saĝe, ke ni restu en la foiro, ĉar ĉi tie povus esti majstro Mrkonja. Li ĝis nun neniam iris al foiroj. Sed kelkajn tagojn antaŭ ol mi foriris li diris: "Kiam estos la plej baldaŭa foiro, mi veturos al ĝi. Certe ne estas por mi nur malfeliĉo en

foiroj."

"Sed kial estus por li nur malfeliĉo ĉe foiroj?", demandis Gita.

"Tion mi ne scias, sed li ĉiam diris, ke el foiro fontas lia tuta malbono."

Tiam diris Hlapiĉ:

"Ne estas saĝe resti. Povus ĉi tie troviĝi majstro Mrkonja. Sed povus ĉi tie ankaŭ troviĝi la nigra homo. Kaj eble ĉi tie estas ankaŭ via mastro kun la cirko."

Gita pri tio koleriĝis kaj diris:

"Sed kial ili ĉiuj estu ĝuste ĉi tie?"

"Ĉar ĉi tie estas multaj homoj - kaj kie estas multaj homoj, povus esti ĉiu", respondis Hlapiĉ.

"Tio ne ĝustas", respondis Gita. "En Vieno estas ankoraŭ pli multaj homoj ol ĉi tie kaj tamen la majstro Mrkonja kaj la nigra homo ne estas en Vieno."

Hlapiĉ ne kapablis paroli tiom kiom Gita kapablis kaj tial li ne volis plu kvereli.

Tial ili restis en la foiro.

Ĉu tio estis saĝa aŭ ne, videblos nur vespere. En la foiro ĉiuj homoj tiom bruegas, ke neniu dumtage havas tempon pensi pri tio, kio estos vespere.

DU KORBOPLEKTISTOJ

Momente por Gita kaj Hlapiĉ estis kompreneble tre bele kaj amuze en la foiro.

Ili venis iuloken, kie oni eĉ pli kriis ol alilike en la foiro.

Tie estis du korboplektistoj.

Unu korboplektisto havis grandan blu-blankan tendon. Sub la tendo troviĝis vicoj da korboj flavaj kiel oro. Kaj supre pendis vicoj da korboj bluaj kaj ruĝaj, grandaj kaj malgrandaj, buntaj kaj orumitaj. Kaj precize en la mezo pendis granda belega korbo.

"Ĉi tien! Ĉi tien!", kriis la korboplektisto en la tendo. "Korboj! Korboj! Per oro plektitaj! Per silko broditaj!"

Efektive la aĉetantoj venadis sub lian tendon kvazaŭ abeloj, ĉar la aĉetantoj plej multe kuras tien, kie estas la plej forta kriaĉo kaj orumitaj varoj.

Ne malproksime sidis surtere alia korboplektisto. Li estis malriĉulo kaj li ne havis tendon. Li sidis sur sako kaj ĉirkaŭ li staris nur deko da simplaj kaj grizaj korboj, ĉar aliajn li ne havis. Li silentis ĉar li ne sciis kiel laŭdi sin. Sed hejme li havis multajn infanojn kaj li malĝojis, ke neniue aĉetas liajn varojn.

Kiam ajn iu virino alproksimiĝis por rigardi la korbojn de la malriĉulo, ekkriis la korboplektisto en la tendo:

"Lasu tiun varon! Ĉi tien, ĉi tien! Ne aĉetu korbojn de sur la tero! Ridos via najbarino, ke vi trovis vian varon inter rubaĵoj. Ĉi tie ĉe mi estas oro!"

Kaj ĉiuj forlasis la malriĉulon kaj foriris sub la tendon aĉetadi la varojn.

Gita kaj Hlapiĉ longe rigardadis, kio okazas. Gita havis bonan koron kaj ankoraŭ pli bonan langon kaj ŝi diris:

"Se nur fulmotondro batus tiun lian tendon, ke tiu granda korbo kovru lin!"

Ĝuste en tiu momento venis denove multaj virinoj al la direkto de la korboplektistoj por aĉetadi.

Jam el malproksimo ekkriis tiu el la tendo:

"Ĉi tien! Ĉi tien! Ĉi tie estas korboj kiel oraj pomoj!", kaj li

ekskuis per mano la korbojn super sia kapo.

"Hlapiĉ!", subite diris Gita "mi havas ideon! Rapide donu vian tranĉilon. Ho! Tio estos ridinda!"

Kaj Gita mem ŝovis la manon en la sakon de Hlapiĉ kaj elprenis la tranĉilon. Ŝi kiel sciuro ekkuris kaj kaŝiĝis malantaŭ la tendo.

"Kio estas, kio nun okazos?", pensis Hlapiĉ.

Sed tio vidindis!

Ĝuste kiam la virinoj alvenis al la tendo por aĉeti la korbojn, okazis io tia, ke ĉiuj, kiuj tie staris, devis krevi pro rido!

Subite nome kvazaŭ pluvo ekfalas la korboj, kiuj pendis super tiu korboplektisto en la tendo.

Unue unu, tiam kvar, poste dek! Tok! tok! tok! Faladis la korboj oraj kaj blankaj, bluaj kaj buntaj.

Disŝiriĝis la ŝnuro sur kiu pendis la korboj!

"Hu! Hu!", kriis la korboplektisto kaj li defendis sin per brakoj kaj per kruroj kiel freneziĝinta vespo.

Tiam - nekredeble! - ŝiriĝis ankaŭ la dua ŝnuro!

Denove ekfalas korboj! Tok! tok! tok! - batadis la korboj la kapon kaj dorson de la korboplektisto. Kaj li svingis kaj saltadis kaj kriis - tiom longe ĝis ankaŭ li falis.

Se vi tion povus vidi! Ruliĝis tiel la korboplektisto inter siaj korboj kaj daŭre kriis kaj kriĉis!

"Hu! Hu!", li provis liberiĝi.

Sed tiam "bum!" Falis ankaŭ la granda korbo kaj ĝi kovris la korboplektiston! Kaj li ne plu videblis! Nur brakoj kaj kruroj troviĝis ekster la korbo. La korbetoj flugis al ĉiuj direktoj, kie li ruliĝis sub la korbo kaj svingis brakojn kaj krurojn!

Ĉiuj ridegis kaj neniue sciis, kiel tio okazis.

Malantaŭ la tendo kaŭris Gita kaj rigardis tra iu trueto en la

tolaĵo kaj ridis.

Ŝi ridis eĉ pli ol la aliaj, ĉar ŝi estis tiu, kiu per la tranĉilo de Hlapiĉ tratanĉis la finaĵojn de ambaŭ ŝnuroj. Apud ŝi kaŭris Hlapiĉ kaj rigardis tra trueto.

Tuj kiam la korboj komencis fali, li sciis, ke tion kaŭzis Gita kaj li kuris malantaŭ la tendon.

Hlapiĉ mem estus neniam farinta tion, kion Gita faris. Sed nun, kiam tra la trueto li rigardis kiel la korboplektisto ruliĝas kiel iu granda insekto inter flavaj korboj - nun ankaŭ Hlapiĉ tiom ridegis, ke la sako saltetis sur lia dorso. Gita tenis la manon sur la buŝo por ke ŝi ne ridkriegu.

"Nun ni fuĝu, ke li ne rimarku nin!", diris Gita. "Dum li ruliĝas ni vendos korbojn de tiu malriĉulo."

Gita kuris al la malriĉa korboplektisto kaj diris:

"Se vi ne kontraŭstaras mi vendos viajn varojn."

Tuj prenis Gita ladteleron, kiun la malriĉa korboplektisto antaŭvidis por mono. La telero ankoraŭ estis malplena.

Gita ekbatis per lignopeco la teleron kaj ekkriis:

"Korboj! Korboj!" Gita batadis la teleron plenforte.

Kaj tuj alvenis multaj homoj kaj virinoj. Kiam ĉe la korboj ekkriĉis la papago kaj tamburis la ladtelero tuj ĉiuj rimarkis, ke tiuj grizaj korboj estas kaj pli bonaj kaj pli firmaj ol tiuj orumitaj. Tiel estas en foiroj kaj ankaŭ aliloke.

Nun multaj ekaĉetis korbon post korbo de la malriĉulo.

Ankoraŭ la kolera korboplektisto ne komplete eltiris sian ruĝan kapon de sub la granda korbo, dume Gita kaj Hlapiĉ jam disvendis ĉiujn korbojn de la malriĉulo.

La malriĉulo miris, ĝojis kaj ridis pro feliĉo. Li pensis, ke Gita kun siaj belaj, helaj haroj falis de la ĉielo por helpi al li.

Kiam la korboj estis disvenditaj, Gita ĵetis la monon en la

ladteleron kaj etendis ĝin al la malriĉula korboplektisto. Ho kiel li dankis!

La korboplektisto ofertis al ili veni al lia malriĉa hejmo kaj tranokti tie. Sed Hlapiĉ kaj Gita volis ankoraŭ vidi la foiron kaj ili nur dankis pro la oferto.

Tiam Hlapiĉ diris:

"Ni nun plu iru, ke ne kaptu nin tiu de sub la korbo."

Do Hlapiĉ kaj Gita foriris. Neniu plu povus trovi ilin inter tiom da homoj.

Kaj la malriĉa korboplektisto sidiĝis kaj kalkulis monerojn en la ladtelero. Estis precize sesdek kronoj.

"Ho, se tiuj infanoj estas tiom bonaj, tiam akompanu ilin feliĉo!", li diris al si mem.

Se la malriĉa korboplektisto sciis, kia malbono atendas ankoraŭ hodiaŭ Hlapiĉ-on kaj Gita-n, li certe kondukus ilin en sian malriĉan loĝejon por protekti ilin.

SUR LA KARUSELO

Jam ĉiuj vendistoj raŭkiĝis pro la kriado - kaj tio en foiro estas signo, ke la vespero proksimas.

Hlapiĉ kaj Gita venis ĉi-momente al jena loko de la foiro, kie turniĝas karuseloj kaj pafas pafilettoj.

Tie estas plej gaje, ĉar ĉiu, kiu unufoje turniĝas sur karuselo, ekhavas kapturniĝojn kaj forgesas ĉiujn zorgojn.

Ĉiuj karuseloj turniĝis, nur unu estis senmova.

Kaj ĝuste tiu estis la plej bela, ĉar ĝi havis mil sonoriletojn kaj estis tute arĝenta.

Sed de la mastro de tiu karuselo fuĝis du servistoj. Unu el ili devintus vendi biletojn por la karuselo kaj la alia devintus alvoki homojn al la karuselo, rajdi lignajn ĉevalojn kaj cigojn kaj montri ĉiaspecajn artaĵojn. Kaj ili ambaŭ devintus tuttempe turniĝadi sur la karuselo.

Kompreneble la mastro ne povis mem fari ĉion, ĉar li estis tre dika kaj li vomemis.

"Tio estas bona!", diris Gita "Ni ofertis nin por tiu laboro kaj ni ricevos vespermanĝon kaj tranoktejon."

Ili do ofertis sin al la mastro de la karuselo. Kiam la mastro vidis verdan pantalonon kaj brilan ĉapon de Hlapiĉ kaj kiam li rimarkis la papagon kaj la arĝentan jupeton de Gita, li tre ĝojis. Ili aspektis kvazaŭ ili vestiĝus por la karuselo. Li tuj akceptis ilin al la laboro.

La mastro eniris kaj streĉis risorton de la maŝino. Hlapiĉ kaj Gita sidiĝis ĉiu sur unu ĉevalo. Trumpeto ektrumpetis: tru-ru! tru-ru! - kaj post momento turniĝis la arĝenta karuselo kaj eksonoris ĉiuj sonoriletoj - mil sonoriletoj! Tio estis ĝojo! Gita staris sur ĉevalo, svingis per manoj kaj riverencis dekstren kaj maldekstren kaj Hlapiĉ kriis: "Nur du kronojn!" Kaj la karuselo turniĝadis tiel ke ŝajnis al ili vidi fulmojn ĉirkaŭ si.

Homoj forlasis aliajn karuselojn kaj ĉiuj venis al tiu ĉi, ĉar tiom bela knabino kaj tiom bunta servisto en botoj estis tie.

Tio daŭris ĝis malfrue en la nokto. Ĉiam pli ĝoje iĝis sur la karuselo kaj la plej ĝoja estis la mastro, kiu arigis plenan sake-ton da mono.

Hlapiĉ daŭre portis al la mastro telerojn plenajn je kronoj.

Tiom, kiom Hlapiĉ dum tiu tago veturis sur la karuselo certe ankoraŭ neniu alia ŝufarista metilernanto faris. Tion ja ne povus pagi eĉ metihelpanto.

Nur Bundaŝ sidis kaj rigardis la karuselon kaj miris pro tio, ke Hlapiĉ tiom turniĝas?

Estis jam tre malfrue, sed dum la karuselo turniĝas neniu povas scii kioma horo estas.

Tial Hlapiĉ kaj Gita ekmiris, kiam la maŝino subite haltis kaj la mastro kriis per forta voĉo al la homoj:

"Koran dankon. Estas la dekunua! Morgaŭ matene ni daŭrigos!"

La homoj disiris kaj la karuselmastro envolvis la tutan karuselon en blankajn litotukojn. Nun videblis nek la mil sonoriletoj nek la arĝento nek la ĉevaloj nek la cigoj sed la karuselo aspektis kiel granda, griza fungo.

Tiam la mastro kondukis Hlapiĉ-on kaj Gita-n al tendo, kie estis vendataj manĝaĵoj.

Jam estis malplena la foiro. Nur ankoraŭ kelkaj homoj kun grizaj lipharoj sidis sub la tendo.

Al Gita kaj Hlapiĉ ne plu tiel plaĉis la foiro kiel dumtage.

La karuselmastro mendis vespermanĝon kaj tiam Gita, Hlapiĉ kaj Bundaŝ vespermanĝis. Ĉiuj silentis, ĉar ili estis lacaj kaj iel malĝojaj.

Kiam ili finmanĝis, ekstaris la mastro, pagis la vespermanĝon kaj ili reiris al la karuselo.

Alveninte tien diris la mastro:

"Kaj nun ĝis revido infanoj, dankon!"

Hlapiĉ kaj Gita ekmiris kaj timiĝis. Ili pensis, ke la karuselmastro akceptos ilin por tranokti.

Hlapiĉ diris tion al la mastro.

La mastro respondis, ke ene estas nur unu lito por li kaj ke ne estas sufiĉa loko por ili.

Tio estis vero, ĉar la mastro estis tiom dika, ke li apenaŭ

povis dormi ene apud la maŝino.

"Kaj apud la ĉevaloj kaj cignoj mi ne permesas dormi" diris la mastro mallonge. Tiam li ankoraŭ diris:

"Ne estas malvarme ekstere kaj la foiro estas granda. Vi povas dormi ie ajn. Ĝis! Bonan nokton!"

Tiam la mastro forŝovis iom la tukon de la karuselo, enŝovis sin enen kaj malaperis.

Gita, Hlapiĉ, Bundaŝ kaj la papago restis en nokta mallumo, solaj sur la granda placo.

Nenie estis iu ajn, nur mallumo.

El ĉiuj tendoj aŭdeblis nur ronkado de komercistoj, kiuj dormis apud siaj varoj.

Tio estis vere malgaja kaj malagrabra. La urbo estis tiom granda - ĝi havis cent stratojn kaj en ĉiu strato cent domojn kaj tamen Hlapiĉ kaj Gita staris ekstere kaj sciis, ke nenie ili povas frapi kaj ke ĉi nokte ili ne havas tranoktejon.

SEN TEGMENTO

Hlapiĉ rigardis al Gita. Tra la mallumo li ne povis bone vidi ŝin sed li tamen rimarkis, ke ŝi klinis la kapon kaj ekkaresis sian bluan jupeton.

Hlapiĉ bone sciis, ke tio estas signo, ke Gita ekploros kaj li ne povis rigardi tion. Tial li diris gaje:

"Ne timu! Estas varme kaj silente. Ni dormos ekstere. Ni almenaŭ havos sufiĉan aeron eĉ se ni ne malfermos fenestrojn."

Tiel ŝercis Hlapiĉ kaj diris:

"Ni serĉu iun bonan lokon."

Tuj apud la karuselo kuŝis malplenaj sakoj kaj tukoj en kiuj komercistoj alveturigis la varojn. Hlapiĉ memoris tion. Li kondukis Gita-n tien. Videblis preskaŭ nenio kaj ili palpatis en mallumo.

"Se ni nur estus foririntaj kun la korboplektisto al lia hejmo!", eksopiris Gita.

"Tiukaze ni ne veturus sur la karuselo", diris Hlapiĉ - kaj ili ambaŭ gajiĝis, kiam ili rememoris pri la beleco, kiam sonoris sonoriloj kaj la karuselo turniĝadis.

Poste Hlapiĉ palpatis en la mallumo sakojn kaj tukojn kaj ordigis ilin plej eble bone.

"Vidu" li diris al Gita "vi dormos kiel la piza princino."

Gita lokigis sian papagon apud si kaj ŝi kuŝiĝis sur sian kuŝejon.

Hlapiĉ kun Bundaŝ kuŝiĝis sur la teron mem.

Bundaŝ mallaŭte kaj malgaje ĝemis - ne pro si, ĉar li ĉiam dormis sur la tero - sed pro Hlapiĉ.

Tio estis tiom malgaja, ke Gita kaj Hlapiĉ devis pri io paroli.

"Kia estis tiu piza princino?", demandis Gita.

Ŝi volonte aŭskultis rakontojn pri princinoj ankaŭ dumtage dum la suno brilis - kaj des pli ŝi ŝatis tion nun, kiam ĉio estis tiom malgaja ĉirkaŭ ŝi!

"Tio estis princino, kiu perdiĝis kaj venis al ora kastelo", ekrakontis Hlapiĉ. "La kastelo estis tute ora, eĉ ŝtupoj kaj sojloj estis el pura oro. Sed en la kastelo vivis iu maljuna reĝino, kiu fidis al neni. Tiu maljuna reĝino do ne kredis, ke vera princino erarvadis al ŝi. Tial ŝi metis en la liton de la princino unu pizon kaj sur ĝin tri pajlomatracojn kaj naŭ lanugkusenegojn. "Se ŝi sentos pizon tra tri pajlomatracoj kaj naŭ lanugkusenegoj, mi scios, ke ŝi estas vera princino", diris la maljuna reĝino. La sek-

van matenon demandis la maljuna reĝino la princinon, kiel ŝi dormis. "Ho" ekploris la princino "mi penis dum la tuta nokto kaj mi plenas je kontuzoj. Estis tuta malmola monto en mia lito." Nun la maljuna reĝino certis, ke tio estas vera princino. Nur vera princino povas esti tiom delikata, ke ŝi sentu unu pizon tra naŭ lanugkusenegoj kvazaŭ monto. Kaj la reĝino donacis al la princino sian reĝan sceptron kaj sian oran kronon, ĉar ŝi jam estis maljuna kaj ŝia kapo jam doloris pro tioma regado."

Tiel rakontis Hlapiĉ. Kaj tio estis tre bela kaj gaja rakonto. En ĝi ekzistas tiom da lanugkusenegoj kaj ora kastelo kaj tial Hlapiĉ kaj Gita multe pli ĝoje endormiĝis sur malmola tero kaj sub serena ĉielo.

Estis akurate noktomezo, kiam ili endormiĝis. Tiel finiĝis la sesa vojaĝtago de Hlapiĉ.

Nun komenciĝis la sepa vojaĝnokto de Hlapiĉ. Ĉio kio dum tiu nokto okazis ŝajnas kvazaŭ miraklo. Sed mirakloj okazas ĉie en la mondo kaj ĉiuj homoj kune ne povus elpensi tiom da mirakloj, kiom da ili ĉiutage en la mondo okazas. Sekve ankaŭ Hlapiĉ dum sia vojaĝo tra la granda mondo travivis tiunokte multajn miraklojn kaj multajn nekutimajn kaj danĝerajn aventurojn.

Sed tamen neniu tro timu. Hlapiĉ estas tiom eta kaj tiom bona, ke li espereble feliĉe evitos ĉiujn danĝerojn.

LA SEPA VOJAĜNOKTO DE HLAPIĈ

KONATA VOĈO

Tuj post kiam Hlapiĉ kaj Gita endormiĝis, vekigis Gita ĉar dormante ŝi ion aŭdis, pro kio ŝia koro pli gaje ekbatis.

Ŝi sidiĝis sur sia kuŝejo kaj aŭskultis. Ie henis ĉevalo.

Unufoje henis ĉevalo. Al Gita ŝajnis, ke ŝi konas tiun voĉon.

Duafoje ekhenis ĉevalo. Al Gita ankoraŭ pli ŝajnis, ke ŝi konas tiun voĉon.

Ankaŭ triafoje henis la ĉevalo kaj Gita saltis de sia kuŝejo kaj ekkriis:

"Hlapiĉ, ho, Hlapiĉ! Se vi sciis, kies ĉevalo henas! Hlapiĉ venu kun mi!"

La luno jam leviĝis en la ĉielo kaj estis pli hele.

Hlapiĉ ekstaris kaj kune kun Bundaŝ kaj Gita ekiris inter tendoj al tiu loko, kie de tempo al tempo aŭdeblis ĉevalhenado.

Baldaŭ Hlapiĉ kaj Gita alvenis sur iun grandan, malplenan spacon. Meze de tiu spaco staris granda tendo, fermita kaj mallaŭta, kvazaŭ ĝi dormus. Super la pordo estis larĝa, nigra tabulo kaj sur la tabulo grandaj literoj.

Tio estis la cirko de Gita!

"Ho, Hlapiĉ! Hlapiĉ!", ekkriis denove Gita "venas mia ĉevalo Soko! Mia kara, mia eta Soko!"

Gita forgesis en tiu momento pri la timo pro la mastro kaj ŝi forgesis, ke ŝi ne plu volis reveni al li. Ŝi nur pensis pri sia ĉevalo kun kiu ŝi dum tiom da jaroj en la cirko vivis en bono kaj malbono kaj kiun ŝi en la tuta mondo plej amis. Gita nun tiom deziris vidi sian ĉevalon kaj ŝi ne povis rezisti al tiu deziro.

"Ho, Hlapiĉ! Mi eniros por vidi mian Soko", diris ŝi.

"Rimarkos vin la mastro kaj ni devos disiĝi", diris malgaje Hlapiĉ.

"Ho ne! Mi ne volas resti ĉe li! En la cirko nun ĉiuj dormas kaj nenion aŭdas, ĉar ĉiuj estas lacaj pro la prezentaĵo", flustris Gita. "Ho, mi petas, ni eniru!"

Ili nun staris tute proksime de la stalo, kiu estis apud la cirko farita el la sama tolaĵo kiel la cirko.

Gita kompreneble bone sciis, kie eblas eniri en ŝian cirkon! Ŝi do levis ĉe unu flanko iom la tolaĵo kaj flustris ankoraŭfoje.

"Vidu Hlapiĉ, ĉi tie ni eniros!"

Kaj jam Gita ŝovis sin en la stalon kaj sekvis ŝin Hlapiĉ kaj Bundaŝ.

Ho, tio vere estis tro danĝera!

NOKTE EN LA CIRKO

Tuj apud la enirejo dormis surpajle iu homo.

"Ne timu", flustris Gita" li ne vekigus eĉ se vi trompetus en liajn orelojn. Mi scias kiel oni dormas post la prezentaĵo."

Sur bastono pendis en la stalo ringego. Tio estis loko, kie kutime troviĝis la papago de Gita.

Gita metis la papagon sur la ringon. Kiam la papago vidis, ke ĝi estas en sia kutima loko, kie ĝi pasigis tiom da jaroj, ĝi pensis:

"Nun ĉio enordas". Ĝi metis la kapon sub la flugilon kaj endormiĝis.

Kompeneble, tio nur ŝajnis al la papago.

Por Hlapiĉ kaj Gita nun fariĝis ĉiam pli danĝere.

Ili feliĉe pasis apud la dormanto.

En la stalo estis enŝaltita la lumo.

Hlapiĉ rimarkis ĉe ĉiu flanko de la stalo po kvar ĉevaloj. Ok ĉevaloj kompreneble ne estis multo por cirko sed por Hlapiĉ tio estis tre multe.

"Ho!", li mallŭte ekkriis "kiomaj ĉevaloj kaj kiom belaj ili estas."

Sed Gita ne aŭskultis. Ŝi jam estis ĉe sia malgranda ĉevaleto.

"Soko! Mia kara Soko!" ŝi flustradis al la ĉevaleto, ĉirkaŭbrakis ĝin ĉirkaŭ la kolo kaj karesis mane sur ties blanka dorso.

Kaj Sokol turnis sian belan kapeton, apogis ĝin al la ŝultro de Gita kaj mallaŭte henis pro kontento.

"Soko mia! Kara mia! Kiel mi nur forlasos vin, kiel mi forlasos vin!", flustradis Gita.

Hlapiĉ iris iom pli for en la stalo.

"Tiu ĉi nigra ĉevalo estas la plej bela" mallaŭte vokis Hlapiĉ.

"Ni ne havas nigran ĉevalon", respondis mallaŭte Gita.

"Vidu, ke ĝi estas ĉi tie", respondis Hlapiĉ.

Gita venis al Hlapiĉ. Kaj vere! Antaŭ ili staris belega nigra ĉevaleto - kiel karbo kaj brila kiel suno. La kolharoj kaj la vosto estis tute mallonge tranĉitaj kaj ĉirkaŭ la artikoj ĝi havis belegajn flavajn genuŝtrumpojn.

Mirigite rigardis Gita la ĉevalon. Ŝi longe rigardis kaj tiam diris:

"Tio estas vera miraklo! Tio estas la sama nigra ĉevalo, per kiu veturis hieraŭ la nigra homo kaj Grga. Kvankam ĝi havas

mallongajn kolharojn kaj mallongan voston kaj flavajn ŝtrumpojn, tamen tio estas la sama nigra ĉevalo."

Hlapiĉ ne kredis tion kaj ili iris al fojnujo por vidi la nigran ĉevalon de pli proksime.

Kaj tiam - ho kiel ektimis Gita kaj Hlapiĉ!

Ili subite aŭdis iun iri tra la cirko al la stalo. Aŭdeblis profundaj, viraj voĉoj, interparolo kaj pezaj paŝoj sur la sablo en la cirko.

"Kion ni faru! Kion ni faru?", timigite flustris Gita.

"Tio estas mia mastro! Ho Hlapiĉ, kara Hlapiĉ, mi ne volas resti ĉe li, mi timas!"

Kion nun faru Hlapiĉ kaj Gita? Ili kaŝiĝis rapide sub la fojnujo antaŭ la nigra ĉevalo.

Hlapiĉ, Gita kaj Bundaŝ ŝoviĝis do rapide sub la fojnjon. Sub la nigra ĉevalo kuŝis fojno. Hlapiĉ levis per manoj la fojnon antaŭ la fojnjon, ke neniu povu vidi ilin.

Tiam en la stalon eniris du homoj.

NOVA DANĜERO

"Dio mia, kiu iras tie?", flustris Hlapiĉ kaj Gita. Ili kaŭris sub la fojnujo kaj kaŝrigardis tra la fojno. Ili silentis kiel musoj, nur iliaj koroj forte batis.

Kiam tiuj du homoj alvenis sub la lampon kaj kiam Hlapiĉ kaj Gita rekonis ilin, tiam ili ankoraŭ pli ektimis.

Tiuj du homoj estis la cirkomastro kaj la nigra homo.

"Hej, de kiam ili konas unu la alian kaj kion ili faras tiom malfrue en la stalo!", ekpensis Gita kaj Hlapiĉ kaj ĉiam pli angore iĝis ĉe iliaj koroj.

Sed kiu povus antaŭvidi, kia nova danĝero atendas Hlapiĉon kaj Gita-n! La nigra homo kaj la cirkomastro ekiris rekte al la nigra ĉevalo kaj ili alvenis tiom proksime al Hlapiĉ kaj Gita, ke de ili disigis ilin nur fojnomanpleno.

Kiel nur nun silentis Hlapiĉ kaj Gita! Tiom mallaŭte ili spiris, ke eĉ unu fojnero ne moviĝis.

"Bundaŝ! Kara mia Bundaŝ! Ne boju!", flustris Hlapiĉ en la orelon de Bundaŝ kaj forte ĉirkaŭbrakis tiun, ĉar li sentis kiel Bundaŝ timiĝis rekoninte la nigran homon. Kaj Bundaŝ estis bona kiel tago, kiam li sentis, ke la manoj de Hlapiĉ tremas, li eksilentis kvazaŭ li estus morta.

Nun la nigra homo kaj la cirkomastro ekparolis.

DU MALICAJ HOMOJ

Se Hlapiĉ ne estus tiom malriĉa, li verŝajne neniam el proksimeco vidus du tiom aĉajn homojn kiel estis tiuj, kiujn li nun devis rigardi kaj aŭskulti. En la mondo ekzistas bonŝance nur tiom malmultaj aĉaj homoj, kiom da putriĝintaj fazeoloj ekzistas en poto kaj tiel ankaŭ en ĉi tiu regiono vivis tiutempe nur tiuj du aĉaj homoj. Sed Hlapiĉ estis malriĉa infano kaj malriĉaj infanoj konas la tutan mondon.

Se Hlapiĉ ne estus tia malriĉulo, li certe ne kaŭrus nun dumnokte sub la fojnujo nek li aŭskultus teruran interparolon inter la nigra homo kaj la cirkomastro.

"Morgaŭ matene mi foriros kun la cirko tra sep urboj en la okan urbon", diris la cirkomastro. "Rigardu nur la nigran ĉevalon, kiel mi beligis ĝin! Kiam ĝi estos kovrita per silko, rimenoj

kaj selo neniŭ plu povos rekonu ĝin, ne timu."

"Mi ne timas, ĉar mi scias, ke vi estas pli saĝa ol vulpo surmonte", respondis la nigra homo. "Sed nun pagu altvalorajn dukatojn por la ĉevalo, ĉar ne estis simple akiri ĝin."

"Mi pagos la dukatojn", diris la mastro. "Sed unue diru al mi, kie nun troviĝas la homo, al kiu apartenis la ĉevalo?"

"De li ne timu! Li troviĝas en arbaro, kie la arbaro estas la plej profunda. Li estas ligita per tri ŝnuroj al la plej forta kverko. Tiu certe ne fuĝos, ĉar mi ligis lin kaj li ankaŭ ne iros baldaŭ al foiro."

Tiel diris la nigra homo kaj ekridis tiom malice, kiel ridas nur malicaj homoj, kiam ili rakontas malicajn aferojn.

Tuj poste elprenis la mastro pezan sakon kaj eknombris orajn dukatojn sur la manon de la nigra homo. Sed iliaj manoj estis tiom nigraj, ke eĉ la oraj dukatoj en ili malheliĝis.

"Do nun adiaŭ! La ĉaro atendas kaj mi devas pluiri dum ankoraŭ noktas", diris la nigra homo.

"Sed kien vi tiom rapidas?", demandis la mastro.

"Ni iras ĉinokte antaŭ la krepusko preni bovinon. Grgan mi sendis jam pasintnokte tien, ke li atendu min. Sed al Grga mi ne tro fidas", diris la nigra homo.

"Kaj kien vi iras preni la bovinon?", demandis la mastro.

"Mi ankoraŭ ne estis tiuloke. Sed oni diris al mi, ke la domo estas sola apudstrate kaj en la domo estas neniŭ krom virino kaj infano. Tio estos simpla laboro. Sed ankoraŭ bezonatas tri horoj veturi tien, ĉar mi ne iros rekte laŭ la plej proksima vojo", diris la nigra homo.

"Kiel vi trovos la domon, se vi diras, ke vi ankoraŭ ne estis tie?", demandis la mastro.

"Simple mi trovos ĝin. Mi aŭdis, ke ĝi estas malgranda,

malnova kaj flikita kaj ke sur ĝi estas granda, blua stelo", respondis la nigra homo.

Tiam ili eliris el la stalo en la cirkon. Tuj poste aŭdeblis, ke ili antaŭ la cirko diris "adiaŭ" unu al la alia kaj "bonan vojaĝon" kaj denove ĉio silentiĝis.

HLAPIĈ DECIDAS

Kiam ekregis la silento, eliris Gita, Hlapiĉ kaj Bundaŝ el sub la fojnujo.

Neniŭ povus eĉ imagi, kiajn sentojn nun havis Hlapiĉ!

El la rakontado de la nigra homo Hlapiĉ eksciis, ke li kaj Grga prirabis la homon, kiu vojaĝis al la foiro kaj ke ili ŝtelis ties varojn kaj ĉevalojn kaj ligis lin en arbaro. Sed kio ankoraŭ pli pezis la koron de Hlapiĉ estis tio ĉi: li nun sciis, ke la nigra homo kaj Grga iras ĉi nokte forkonduki la bovinon de Marko kaj lia patrino, kiuj estis tiom malriĉaj! Kompreneble, ke la nigra homo parolis pri la domo de Marko, ĉar nur la domo de Marko estis en tiu regiono tiom malgranda kaj malnova kaj nur ĝi havis grandan, bluan stelon sub siaj fenestroj.

Pripensinte ĉion, diris Hlapiĉ la jenon:

"Adiaŭ Gita, mi devas rapidi. Restu ĉe via mastro kaj ne ploru."

Sed Gita ekploris jam antaŭ ol Hlapiĉ sukcesis findiri ĉi tiujn vortojn.

"Kien vi iras Hlapiĉ?", flustretis ŝi.

"Mi devas atingi la domon de Marko antaŭ ol la nigra homo estos tie por diri al la patrino de Marko, ke ŝi atentu pri sia bovino", respondis Hlapiĉ.

Ho, povra Hlapiĉ, kian bonan koron li nur havas! Kaj kiom longas la vojo lin atendanta kaj kiom etas liaj kruroj!

"Hlapiĉ, Hlapiĉ! Tio estas malproksima kaj la nigra homo veturas per ĉaro!", flustris Gita.

"Ĝuste tial mi devas rapidi. Adiaŭ Gita, por vi estas pli bone resti!", diris Hlapiĉ.

"Mi kuniros", respondis Gita kaj ĉesis plori.

Hlapiĉ ne havis tempon por paroli. Tial li respondis nenion, sed ekiris al tiu malfermaĵo tra kiu ili eniris la stalon, li levis la tolaĵon kaj eliris kun Bundaŝ en la lunlumon. Ilin sekvis Gita.

Hlapiĉ parolis nenion. Liaj botoj rapidante batadis la ŝtonojn de longa, urba strato. Post li same tiom rapidante batadis la malgrandaj ŝuetoj de Gita. Plej rapide tretadis la piedoj de Bundaŝ.

Fine ili eliris el la urbo, kie ŝajnis al ili, ke ĉiuj fenestroj aŭskultas, ĉu ili diros ion pri la nigra homo.

Antaŭ ili nun kuŝis en la lunlumo longa kaj senfina strato.

Dio scias ĉu la luno vidas tie malproksime ĉe la strato dome-ton kun blua stelo kaj ĉu ĝi feliĉe kondukos ĉi-nokte Hlapiĉ-on kaj Gita-n al ĝi.

NOKTA VOJAĜO

Multaj homoj rakontas, ke herboj kaj floroj nokte interparolas. Se tio veras, tiam certe ĉi-nokte ĉiuj herbejoj flustradis:

"Ho, etaj infanetoj! Kien vi iras nokte sur tiel longa vojo?"

Sed Hlapiĉ ne pensis pri tio, ke tiu vojaĝo estas longa nek li pensis pri tio, ke li ne povas trairi ĝin pli rapide ol tiu, kiu vojaĝas perĉare. Hlapiĉ nur pensis pri tio, ke li ĉiukaze devas atingi la

domon de Marko antaŭ la krepusko. Kaj tio estas tre bona, ĉar kiu tiel pensas, ties kruroj marŝas per si mem.

La kruroj de Hlapiĉ vere tiom bone kaj rapide marŝis, ke Gita baldaŭ laciĝis. Tio estis pro tio, ĉar ŝi ne konis Marko-n kaj ne tiom varme deziris helpi al li, kiom Hlapiĉ.

"Hlapiĉ! Mi ŝatus iom ripozi", diris post iom da tempo Gita.

Nokte ĉiu homo pli mallaŭte parolas, ĉar estas tia trankvilo, ke ĉiu vorto aŭdeblas malproksime.

"Mi ne lacas", diris Hlapiĉ. "Mi ne havas tempon. Ankoraŭ iomete Gita." Li tuj ektimis, ke estos malfacilaĵoj pro Gita.

Gita nur iom sopiris kaj ili plutretadis sur la strato.

Kompreneble, ke Gita senĉese pensis pri la nigra ĉevalo, pri Grga kaj la nigra homo. Ŝi pensis pri tio, kiel ili povis konduki la nigran ĉevalon al la cirko preter tom da gardistoj en la urbo. Finfine ŝi demandis Hlapiĉ-on:

"Kiel okazis, ke la gardistoj ne kaptis la nigran homon kaj Grga, kiam ili alveturis per la nigra ĉevalo en la urbon?"

"Tio estas pro tio, ke ĉi tie la gardistoj kutime staras ĉe anguloj kaj maliculoj veturas meze da la srato", respondis Hlapiĉ.

Tio fakte ŝajnis al Gita tre ridinda, sed ŝi tuj pensis, ke Hlapiĉ estas metilernanto kaj do verŝajne pli saĝa ol ŝi. Tial Gita denove eksilentis.

Ĉiukaze ilia konversacio neniel taŭgis, ĉar tamen malgraŭ la interparolo estis tre strange nokte vojaĝi kaj tiu, kiu ankoraŭ ne iris nokte inter herbejoj, pensus, ke li sonĝas.

Apud Gita kaj Hlapiĉ daŭre preterflugadis grandaj noktaj papilioj, kiuj batadis per flugiloj kvazaŭ birdoj. Sur la herboj apud la strato trotis apud Gita iu hirta erinaco kaj tie sur herbejoj rigardetis ĉiumomente longaj oreloj de iu leporo. Kaj tio, kio susuris kaj kuradis tra la arbustoj apud Hlapiĉ kaj Gita, estis

koturnoj.

Nokte la bestoj ne fuĝas tiom for de homoj kiom tage kaj ili ne estas tiom timemaj, ĉar la bestoj scias, ke homoj timas dumnokte kaj ili ne timas.

Kaj fakte estus por Hlapiĉ kaj Gita terure tiel nokte marŝi sur granda strato. Sed kun ili estis Bundaŝ kaj Bundaŝ ĝoje kuris antaŭ ili, svingis la voston kaj levis la kapon al Hlapiĉ, kvazaŭ li dirus:

"Ni nur iru! Mi ĉion bone konas!"

Kiam ili tiel trapasis ankoraŭ unu vojparton, diris Gita:

"Hlapiĉ, permesu, ke ni iom ripozu! Mi ne plu povas iradi!"

Fakte la kruretoj de Gita estis ankoraŭ pli malgrandaj ol tiuj de Hlapiĉ kaj ŝi surhavis sur ili nur etajn silkŝuetojn dum Hlapiĉ surhavis botetojn.

"Ho Gita, estas ankoraŭ longa vojo antaŭ ni, ankoraŭ necesas trairi multajn vilaĝojn kaj unu vojkruciĝon" diris Hlapiĉ.

Kiam Hlapiĉ menciis la vojkruciĝon, rememoris Gita, kiel tie ĉe la vojkruciĝo hieraŭ rapidegis la ĉaro kaj la timigitaj ĉevaloj kaj kiel antaŭ ili aperis la nigra homo.

"Hlapiĉ, Hlapiĉ, kio okazus, se lia ĉaro nun alrapidus kaj li trovus nin surstrate?", diris Gita kaj ekploris.

Kiam Gita ekploris, tiam kompreneble ne plu eblis pluri. Ŝi sidiĝis apud la strato kaj kovris la vizaĝon per la manoj.

Hlapiĉ staris apud ŝi kaj silentis. "Kion mi nun faru?" pensis Hlapiĉ. Li ne povis lasi Gita-n sola nokte survoje kaj kun ŝi li certe ne alvenos al la domo de Marko antaŭ la krepusko. Hlapiĉ malĝojis ĉar al li ŝajnis, ke el malproksimo li aŭdis kiel la nigra homo ŝteliras por forkonduki tiun belan, buntan bovinon de Marko! "Kion mi faru? Kion mi faru?", pensis Hlapiĉ. Dio mia! Se iu venus nun por helpi al tiu eta metilernanto, kiu malĝoja

staras nokte sur la strato!

ĈARO EN NEBULO

Staris Hlapiĉ kaj rigardis dekstren kaj maldekstren kvazaŭ li atendus ies helpon.

Tiel rigardante reen al la urbo rimarkis Hlapiĉ, ke en malproksimo moviĝas io sur la strato. Sed de sur la apuda herbejo treniĝis nebulo trans la strato kaj en la lunlumo ne rekoneblis, kio moviĝas en la nebulo. Nur aŭdeblis, ke io mallaŭte, malrapide knaras.

Ennokte neniu pensas "tio estas amiko", sed ĉiu pensas "tie certe venas malamiko".

Tiel ja okazis ankaŭ al Hlapiĉ, kiam li komprenis, ke alvenas ĉaro sur la strato.

Estis ia stranga sento ĉirkaŭ lia koro, kiam Gita plorante flustretis:

"Ho Hlapiĉ, kial ni ekvojaĝis nokte?"

Nur Bundaŝ levis la faŭkon kaj kontentis.

La ĉaro alproksimiĝadis kaj ŝajnis, ke granda monto ruliĝas surstrate. En la nebulo ĉiu afero ŝajnas trioble pli granda ol ĝi vere estas.

Jam la ĉaro alvenis proksimen al Hlapiĉ kaj Gita.

Videblis ankaŭ homo, kiu sidis en la ĉaro kaj pelis sian maldikan ĉevalon.

Tiam la bona luno ankoraŭ pli lumigis per sia arĝenta lumo la ĉaron kaj la homon kaj Hlapiĉ kaj Gita ekkriis pro feliĉo.

Ili rekonis sian amikon, malriĉulon, korboplektiston de la foiro.

LA HELPO

Efektive ne temis pri miraklo, ĉar la korboplektisto ne veturis tie pro tio, ke Hlapiĉ kaj Gita bezonis helpon meznokte sur la strato, sed ĉar li tie ofte veturis ankaŭ, kiam ili ne ĉeestis.

La korboplektisto veturis kutime malproksimen al iu salikejo por kolekti bonajn vergojn por korboj, ĉar proksime de la urbo ne ekzistis bonaj vergoj. Neniu alia korboplektisto iris tiom malproksimen por kolekti vergojn kiel tiu malriĉulo, sed tial ankaŭ neniu havis tiom firmajn kaj bonajn korbojn kiel li.

Kial ĝuste li devis esti la plej malriĉa en la tuta urbo, kvankam li veturis plej malproksimen por preni la plej bonajn vergojn kaj kvankam li plektis la plej bonajn korbojn - pri tio pensi Hlapiĉ nun ne havis tempon. Pri tio jam saĝuloj en urbo verkis grandajn librojn, sed ankaŭ ili ne sciis, kial estas tiel.

Hlapiĉ, Gita kaj Bundaŝ ekrapidis al la ĉaro.

Kiam la korboplektisto rimarkis ilin en la lunlumo surstrate, li ekpensis ankoraŭ pli ol antaŭe, ke tiuj infanoj falis el la ĉielo kaj ke ili nokte vojaĝas en la lunlumo kaj tage helpas al malriĉuloj.

Sed Hlapiĉ nun mem bezonis helpon kaj li petis la korboplektiston, ke lin kaj Gitan li kunprenu parton de la vojo.

La korboplektisto estis ĝojega, ke li povas helpi al tiuj infanoj, kiuj en la foiro estis tiom bonaj al li - do Hlapiĉ kaj Gita sidiĝis en la ĉaron kaj la korboplektisto ekpelis la maldikan ĉevalon.

Hlapiĉ tuj rakontis al la korboplektisto, kial ili nokte vojaĝas. Fine li diris:

"Antaŭ la krepusko mi devas esti ĉe la malgranda dometo,

kiu havas bluan stelon kaj troviĝas sola ĉe la strato."

"Mi scias, kie estas tiu dometo", respondis la korboplektisto. "Ĝi ne estas malproksime de mia salikejo. Kiam ni alvenos al la salikejo mi montros al vi la vojon ĝis la dometo. Vi estos tie multe antaŭ la krepusko."

Ke tio por Hlapiĉ estis agrabla, ĉiu povas imagi. Tuj ŝajnis al li la strato malpli longa.

La maldika ĉevalo de la korboplektisto marŝis bone kaj rapide. Ĉe la bona mastro ĉiam estas ankaŭ bona ĉevalo kaj la ĉevalo de la korboplektisto nun sciis, ke temas pri io grava, pro kio lia mastro nun subite pelas lin.

La ĉaro daŭre knaris, Hlapiĉ kaj la korboplektisto interparolis, Gita endormiĝis en la ĉaro kaj Bundaŝ ĝoje kuris nun apud la dekstra, nun apud la maldekstra rado, kiel ja okazas de kiam en la mondo ekzistas hundoj kaj radoj.

Tiel ili veturis ĝis la jena vojkruciĝo, kie la strato dispartiĝis al du direktoj.

"Ni veturos al ĉi tiu flanko, trans la monto kaj tra la arbaro, ĉar tio estas pli mallonga vojo", diris la korboplektisto al Hlapiĉ.

"Ho ne iru tiuvoje", ekkriis Gita, kiu tuj vekiĝis, kiam ŝi aŭdis, ke veturendas tra la arbaro. "Tio estas arbaro, kie oni prirabis iun homon."

Sed la korboplektisto jam dum multaj jaroj veturis sur ĉi tiu vojo kaj li ne povis kredi kion Hlapiĉ kaj Gita rakontadis. Tial li diris:

"Tio estas multe pli mallonga vojo al mia salikejo. Ne timu pri io ajn. Mi ankoraŭ ne vidis en tiu ĉi arbaro malbonan homon."

La korboplektisto estis malriĉulego kaj malriĉaj homoj preskaŭ ne konas la timon.

Tiel ili direktiĝis perĉare al la monto tra la arbaro.

Por Hlapiĉ tio estis bona kaj ĝojiga, ĉar li sciis, ke temas pri pli mallonga vojo al la domo de Marko. Kaj se oni iras helpi al iu, oni timas nenion krom, ke oni povus veni tro malfrue.

HLAPIĈ KAJ GITA REE SOLAJ

Ili veturis unue sur la strato montsupren kaj tiam ili eniris la arbaron. La arbaro estis tiom lunlumigita, ke ĝi ŝajnis kvazaŭ lumigita kastelo.

La luno daŭre estis klara. Ĉu estis iu nubeto en la ĉielo, tion povis vidi nek Hlapiĉ nek la korboplektisto, ĉar la arbaro estis ĉirkaŭ ili.

Kiam ilia ĉaro eliris el la arbaro, Hlapiĉ rimarkis, ke ili troviĝas pinte de la monto, kiu ne estis tro alta.

Kaj la korboplektisto haltigis la ĉaron kaj diris:

"Jen infanoj, tiu ĉi vojo maldekstre gvidos vin al la dometo kun la blua stelo. Unue vi alvenos al densejo tie sube. Kiam vi trairos la densejon vi tuj vidos la dometon."

Tiam diris la korboplektisto, ĉar li rimarkis, ke surĉiele troviĝas granda nubeto:

"Vi estos sur la strato antaŭ ol la nubeto kovros la lunon."

Nuĵa, Gita volis ĉion kontraŭdiri! Kiel ŝi timiĝis, kiam ŝi aŭdis, ke ili denove restos solaj!

Sed Hlapiĉ tuj forsaltis de la ĉaro kaj diris al la korboplektisto:

"Dankon, ke vi helpis al ni!"

Kaj la korboplektisto formetis Gita de la ĉaro kaj diris:

"Feliĉe pluiru, karaj infanoj!"

Tiam li ekpelis la ĉevalon kaj ekiris dekstren dekkliven. Hlapiĉ diris al Gita:

"Nia vojo estas maldekstre surdeklive."

Tio okazis tiom rapide, ke Gita ne sukcesis diri aŭ kontraŭdiri eĉ unu vorton.

Sekve Gita kaj Hlapiĉ restis denove solaj kun Bundaŝ en la lunlumo inter la arbaro kaj la densejo survoje.

Ankoraŭfoje el la malproksimo anonciĝis la korboplektisto vokinte ilin:

"Infanoj!"

"Hoj!", respondis Hlapiĉ, ĉar en arbaroj kaj montoj nenio tiom bone aŭdeblas kiel "hoj!"

"Atentu! Proksime de la vojo estas elfosita kanalo."

Kaj vere sube apud Gita kaj Hlapiĉ videblis en la lunlumo elfosita kanalo, kie oni elfosis ŝtonojn.

Estus danĝere en la mallumo iri tien, ĉar piedoj povus gliti kaj vojaĝanto povus fali kaj pereii.

Sed Hlapiĉ kaj Gita pasis apud tiu kanalo en klara lunlumo tute facile kaj baldaŭ ili malsupreniris de la monto en la ebenaĵon.

La koro de Hlapiĉ estis gaja, ĉar li sciis, ke tie malantaŭ tiu densejo estas strato kaj la dometo de Marko kun la blua stelo.

Nun estos ĉio bona, se restos klara lunlumo kiel la korboplektisto diris.

EN LA DENSEJO KAJ MALLUMO

Nuboj ne flugas tiel kiel homoj deziras, sed kiel ventoj ilin portas.

Antaŭ la densejo vidis Hlapiĉ kaj Gita sian vojon klare kva-
zaŭ dumtage.

Sed kiam ili eniris la densejon kaj troviĝis en ĝi, fariĝis la
lunlumo pli kaj pli malforta. La nuboj kovris la lunon.

La vojo tra la densejo estis mallarĝa kaj malbone videbla.

"Ni nur iru! Ni iru!", diradis Hlapiĉ al si mem. "Mi ĉion
bone vidas."

Hlapiĉ tre saĝe agis dirante tion al si mem. Liaj okuloj tuj
multe pli bone vidis en la mallumo.

Gita postiris Hlapiĉ-on, ĉar ŝi nenion vidis en la mallumo
kaj Bundaŝ iris antaŭ Hlapiĉ.

Tiam venis la nuboj kaj tute kovris la lunon. La nuboj estis
densa kaj peza. Nun vere en la densejo estis tia mallumo, ke
nenio videblis.

Hlapiĉ palpatis mane por trovi la vojon kaj dornoj kaj ver-
goj frapis kaj pikis la bluan jupeton de Gita de dekstre kaj maldek-
stre.

"Nu ni ne povas pluiri", diris Hlapiĉ "ĉar ni ne vidas la vojon
kaj ni perdiĝus."

Kompreneble, tio estis malĝojiga afero, ĉar ili urĝis al Mar-
ko.

Sed Hlapiĉ ne volis malgaji, ja li rigardis al la ĉielo kaj esp-
eris, ke la nuboj baldaŭ foriros kaj la domo de Marko ne plu
malproksimas.

"Nun ni iom sidiĝos kaj atentos", diris Hlapiĉ al Gita.

Tiam ili sidiĝis en la mallumo kaj en la silento sur iun ŝti-
pon, kiu kuŝis en la densejo kaj ili silentis.

Ĉirkaŭ ili estis certe inter vergoj de la densejo multaj birdoj:
merloj, paruoj kaj sovaĝaj kolomboj. Sed ili kompreneble silen-
tis samkiel Hlapiĉ kaj Gita, ĉar ili verŝajne timis la vulpon.

"Ho, mi devas sukcesi ĝustatempe atingi la dometon de
Marko!", diris finfine Hlapiĉ.

"Ho dio, nur la nigra homo ne iru la saman vojon!", sopiris
Gita.

"Li diris, ke li iros sur la ĉirkaŭvojo kaj tio ĉi estas mallongi-
go", respondis Hlapiĉ.

Samtempe ŝajnis al Hlapiĉ kaj Gita, ke daŭre estas en la
densejo trankvile kiel antaŭe.

Aliflanke de la densejo, malantaŭ ili, io eksusuris.

"Ho Hlapiĉ! Kio estas tio?", demandas Gita mallaŭte.

"Verŝajne estas leporo", respondis Hlapiĉ.

Tiam aŭdeblis, kiel frakasiĝas sekaj branĉoj.

"Ho Hlapiĉ! Hlapiĉ! Kio estas tio?", flustris Gita ĉiam pli
mallaŭte en tiu ĉi mallumo.

"Eble estas vulpo", respondis Hlapiĉ, ekstaris de la ŝtupo kaj
tenis Bundaŝ-on apud si.

Sed li daŭre povis vidi nenion, ĉar la nuboj ankoraŭ estis antaŭ
la luno.

Tiam la arbustoj ekkrakis ĉiam pli kaj pli proksime. La
branĉoj rompiĝis kaj Hlapiĉ nun sciis, ke io granda iras tra la
densejo.

"Ho, Hlapiĉ! Hlapiĉ! Tio ne estas vulpo!", flustris Gita
mallaŭte kiel spiro.

"Tiukaze temas pri" ekparolis Hlapiĉ.

Tiam ekkriis Gita plenvoĉe:

"Hlapiĉ! Hlapiĉ!"

Tute proksime de Gita ektusis homo.

LA TERURO

Kiam Gita ekkriis kaj vokis Hlapiĉ-on, ĉesis subite la susurado en la arbustoj. Ho! Tio estis ankoraŭ pli terura! Tiu silento kaj la mallumo, nenia movo kaj tamen Hlapiĉ kaj Gita scias, ke ĉi tie en arbustoj tute proksime al ili estas homo! Sed ili ne scias, kiu li estas kaj kion li volas!

Sed Bundaŝ tiras kaj tiradas Hlapiĉ-on kaj timtremas pro ekscito.

Tiam - subite - ekbalanciĝis la arbustoj, malantaŭ Gita kaj Hlapiĉ frakasiĝis kelkaj sekaj vergetoj - kaj Hlapiĉ kaj Gita rimarkis en la mallumo, ke antaŭ ili subite aperis sur la vojo iu alta kaj dika homo. Post momento Hlapiĉ kaj Gita vidis, ke tiu homo bruligis alumeton.

La alumeto ekflamis

Kiu legis tiun ĉi libron ĝis nun kaj ekŝatis Hlapiĉ-on, tiu plej bone farus, se li fermus la libron kaj ĝin ne plu legus ĝis morgaŭ.

LA SURPRIZO

La alumeto ekbrulis. Ĉirkaŭ la homo lumiĝis. Hlapiĉ rigardis lian vizaĝon ...

Tio estis majstro Mrkonja!

Ho Dio mia! Ĝuste la majstro Mrkonja! En disŝiritaj vestaĵoj kaj pala li staris antaŭ Hlapiĉ kaj ekkriis per sia forta voĉo:

"Tio estas vere vi, Hlapiĉ!"

"Majstro!" ekvoĉis Hlapiĉ kaj etendis ambaŭ brakojn al la majstro - eble pro timo eble pro ĝojo.

Kion tiam faris la majstro Mrkonja?

Ho se vi scius!

La majstro Mrkonja rapide alpaŝis Hlapiĉ-on, levis lin al si kaj diris: "Ho, eta mia Hlapiĉ!"

Kaj tiam la unuan fojon en sia vivo karesis la majstro Mrkonja la vizaĝon kaj la kapon de Hlapiĉ.

Absolute vere! La majstro Mrkonja karesis Hlapiĉ-on! Pri tio Hlapiĉ vere miris pli ol pri iu ajn alia miraklo, kiu okazis ĉi-nokte aŭ kiu dum lia tuta vivo ankoraŭ okazos!

Kia miraklo, ke nun en tiu ĉi momento majstro Mrkonja kaj Hlapiĉ pro feliĉo iom ekploris - kvankam la ploro kutime konvenas nek al vera majstro nek al vera metilernanto, ĉar ili ambaŭ estas veraj viroj kaj ne rajtas plori.

KIEL TIO OKAZIS?

Tiam en la densejo en la mallumo sidiĝis sur la saman ŝtipon Hlapiĉ, majstro Mrkonja kaj Gita.

Ili estis tiom mirigitaj pri ĉio, kio okazis, ke ili ankoraŭ ne vere sciis, kion ili nun faru kaj kion ili unue diru. Ŝajnis al ili, ke ankaŭ la luno mem, kiu ĵus denove aperis de malantaŭ la nuboj ekmiris pri tio!

Nur Bundaŝ ne miris. Li levis la antaŭajn krurojn sur la genuojn de Hlapiĉ kaj li rigardis foje majstron Mrkonja foje Hlapiĉ-on. Bundaŝ nome certis, ke Hlapiĉ kaj majstro Mrkonja ĉi tie renkontiĝis por tajli botojn kaj ŝuojn kaj li nun atendis, kiam

la majstro elprenos tondilon kaj alportos ledon. Hundoj neniam povas ion novan pensi - sed ili nur pensas pri tio, kio jam pli ofte okazis.

Sed majstro Mrkonja nun ekrakontis, kiel li alvenis ĉi tien kaj Hlapiĉ nun eksciis tiom da aferoj, ke li miregis dum postaj ok tagoj.

Ke la samo ne okazu ankaŭ al tiuj, kiuj legas tiun ĉi libron, ni mallonge rakontos, kio okazis al majstro Mrkonja.

La majstron prirabis en la arbaro maliculoj, kiam antaŭ du tagoj li veturis kun varoj al la foiro. Li estis tiu prirabita komercisto, pri kiu rakontis almozulino Jana. Tio okazis jene:

Majstro Mrkonja veturis frue dum la tagiĝo tra la arbaro al la foiro kaj li estis sola en la ĉaro, ĉar tiu kaleŝisto, kies ĉevaloj tio estis, forveturis antaŭe per alia ĉaro.

Kiam majstro Mrkonja atingis per sia ĉaro al la loko, kie la arbaro estas plej densa, sursaltis lin el embusko du homoj.

Ili ŝetis lin de sur la ĉaro, ligis lin kaj kondukis profunden en la arbaron. Tie ili ligis lin al iu arbo kaj lasis lin sen manĝo kaj trinkaĵoj kaj foriris.

Du tagojn restis majstro Mrkonja tiel ligita al la arbo kaj li jam pensis, ke li ne plu estos savita kaj rekomendis sian animon al Dio. Li pripensis pri ĉiu bono kaj ĉiu malbono, kiun li en sia vivo faris. Li rememoris ankaŭ pri Hlapiĉ kaj ekdeziris ankoraŭfoje vidi lin. Se homo dum du tagoj estas sen manĝaĵo kaj trinkaĵo ligita al arbo, li havas sufiĉan tempon reрпиensi ĉion kaj nun li tute alie pensas pri sia metilernanto ol li pensis, dum li en la laborejo kriis kontraŭ li.

Majstro Mrkonja do jam klinis sian kapon kaj ne plu esperis pri savo, li estis konvinkita, ke li neniam viva estos malligita de tiu ĉi arbo. Tiel li nun rakontis al Hlapiĉ.

"Sed ĉi nokte", li plurakontis "mi vidis subite, ke en la lunlumo venas al mi unu el tiuj du homoj, kiuj prirabis min. Mi pensis, ke tio estos mia fino. Sed kiam tiu homo alproksimiĝis, li alpaŝis min kaj malligis la ŝnuron, per kiu mi estis ligita. Kiam li malligis min, li diris:

"Iru nun kun la kara Dio kaj rapide fuĝu el tiu ĉi arbaro!"

Tiam li elprenis el la poŝo ligitan tukon. En la tuko estis envolvita arĝenta mono. Li elprenis la monon, etendis ĝin al mi kaj diris mildvoĉe:

"Prenu ĉi tiun monon. De kiam mi ricevis tiun ĉi monon, turniĝis mia koro de malbono al bono. Eble ĝi ankaŭ al vi portos feliĉon. - Kaj mi iras al la vasta mondo por pripenti miajn pekojn."

Aŭdinte tiun rakonton, ekkriis Hlapiĉ:

"Ho! Tio estis Grga! Tio estas arĝenta mono, kiun mi alportis al li de lia patrino. Ho, ne ploris senkaŭze lia maljuna patrino super tiu ĉi arĝenta monero!"

"Ŝi vere ne senkaŭze ploris, ĉar tio estas mirakla arĝenta monero", respondis majstro Mrkonja.

"Eble tial ankaŭ majstro Mrkonja nun estas tiom bona kun mi, ĉar ĉe li estas tiu ĉi mirakla monero", ekpensis Hlapiĉ. Hlapiĉ estis tre ĝoja pro tio. Li nome jam pensis, ke eble majstro Mrkonja estas tiom bona nur tial, ke li du tagojn estis sen manĝaĵo kaj trinkaĵo.

Poste majstro Mrkonja finis sian rakontadon kaj diris:

"Tiel pro la foiro mi travivis jam la duan malfeliĉon."

"Kaj kiel malfeliĉigis vin la foiro la unuan fojon?", demandis Hlapiĉ.

"Tion mi hejme rakontos al vi. Ni nome nun revenos hejmen, eta Hlapiĉ kaj estos bone al vi tie, ne timu. - Nun mi ne

povas rakonti, mi ja malsategas, ĉar mi formanĝis nur peceton da seka pano, kiu restis en mia poŝo, soifon mi apenaŭ forigis ĉe la rivereto."

La nubo malaperis kaj estis denove klara lunlumo. Majstro Mrkonja rigardis al Gita, kiu daŭre sidis mallaŭta kaj trankvila kiel eta kaj bela sed timigita birdeto.

"Sed kiu estas tio?", demandis majstro Mrkonja.

"Ŝi estas orfino sen patro kaj patrino kiel mi. Ni vojaĝas kune", respondis Hlapiĉ.

"Ni kunprenos ankaŭ ŝin hejmen", respondis la majstro kaj al Hlapiĉ ŝajnis, ke la majstro malĝoje suspiris.

Tiam turnis sin Hlapiĉ al Gita:

"Ho, kiom da tempo mi nun perdis. Jen la luno estas klara, ni rapidu al la domo de Marko!"

"Ni iru kune", diris majstro Mrkonja. "Ankaŭ al mi tiu ĉi arbaro ne karas. Vi rakontos al mi survoje, kien vi tiom rapidas.

ĈE LA DOMO DE MARKO

Baldaŭ ili eliris el la densejo. Majstro Mrkonja prenis Hlapiĉ-on je unu mano kaj Gita-n je la alia. Kompreneble, ke tiel estis tre bele vojaĝi trans la herbejo en la lunlumo. Hlapiĉ rakontis al la majstro pri la nigra homo kaj pri la bovino de Marko.

Tiam ili eliris sur la straton kaj videblis jam proksime la dometo de Marko. Baldaŭ ili alvenis al ĝi. Ĉirkaŭ la domo estis ĉio ankoraŭ trankvila kaj videblis, ke ankoraŭ nenia malbono okazis. Malantaŭ la stalo aŭdeblis la sonorilo. Tio estis la bela,

bunta bovino, kiu ene maĉis la fojnon kaj sonorigis per sia ĉirkaŭkola sonorilo.

Ho kiel ĝoja nun estis Hlapiĉ, kiam li vidis, ke li alvenis ĝustatempe, ĉar la nigra homo ankoraŭ ne forkondukis la bovinon!

Okazis tio tuj antaŭ la tagiĝo.

En la dometo estis silento. Marko kaj lia patrino ankoraŭ dormis.

Hlapiĉ frapis je la pordo kaj la patrino de Marko eliris por vidi kiu frapas.

Rapide Hlapiĉ rakontis al ŝi, kial li alvenis kaj diris, ke ŝi prizorgu sian bovinon.

Kiam la patrino de Marko aŭdis pri kio temas, ŝi levis tri foje la manojn al la ĉielo kaj dankis al Dio, ke li sendis al ŝi Hlapiĉ-on.

Se la nigra homo forkondukus ŝian bovinon, restus al ŝi kaj Marko nur dek anseroj. Kaj helpe de dek anseroj ne povas vivi patrino kun infano.

"Cent foje mi dankas al vi, infano mia!", diris ŝi kaj ĉirkaŭbrakis Hlapiĉ-on.

Tiam Hlapiĉ adiaŭis de ŝi kaj pluiris kun majstro Mrkonja kaj Gita, kiuj atendis lin sur la strato.

La patrino de Marko tuj vestis sian plej bonan robon kaj iris en la policejon voki gardiston.

De tiu tempo gardis du distriktaj gardistoj ĉiunokte ŝian etan dometon. La distriktaj gardistoj estas tre kuraĝaj, ili aŭdas kaj vidas malproksimen kaj kie ili gardas, tie nenio malbona povas okazi.

Sed la nigra homo venis nek tiun nek la postan nek la trian nokton: li venis neniam. Post kiam la gardistoj finfumis ĉiu po

tridek pipojn - ĉiunokte po tri - ili ne plu venis.

Oni post kelkaj tagoj trovis mortan homon, kiu falis verŝajne ennokte en tiun fosajon, kiun la korboplektisto montris en la lunlumo al Hlapiĉ kaj Gita.

La mortinto estis volvita en nigran pluvmantelon. Estis la nigra homo, kiu tiel finis sian malican vivon.

Kiam la nuboj kovris la lunon, li pasis verŝajne apud la kanalo, falis enen kaj mortis.

Tiel la sama nuboj, pro kiu en la densejo tiom malĝojis Hlapiĉ kaj Gita, savis ilin kaj la patrino de Marko, sed ankaŭ majstron Mrkonja. Se ne estintus tiu nuboj, Dio scias ĉu la nigra homo mortbatus ilin ĉiujn.

Tial necesas ĉiam iom atendi antaŭ ol ekmalĝoji.

* * *

Tiel do finiĝis ĉiuj danĝeroj kaj ĉiuj malbonoj dum la vojaĝo de Hlapiĉ. Kio ankoraŭ okazos, estas nur ĝojoj kaj feliĉoj, tia kiam Hlapiĉ certe eĉ ne esperis, dum li antaŭ ok tagoj tiel sola kaj malgaja pretigis sin nokte kaj en la mallumo forkuri de majstro Mrkonja.

EPILOGO

FELIĈO KAJ ĜOJO

Ne indus rakonti, kiel majstro Mrkonja, Hlapiĉ, Gita kaj Bundaŝ vojaĝis al la urbo kaj domo de la majstro. Tio ja ankaŭ Hlapiĉ-on mem ne plu interesis. Feliĉaj homoj nome vojaĝas sen scii, ke ili vojaĝas.

Hlapiĉ survoje kolektis belan bukendon da kampaj floroj: ruĝaj papavoj kaj blankaj lekantoj - kaj tio estis ĉio, kio okazis survoje.

Tiel ili alvenis en la urbon antaŭ la domon de la majstro - kaj eniris la korton.

Ho kiel ekĝojis la majstrino, kiam ŝi subite revidis kaj majstron Mrkonja kaj Hlapiĉ-on kaj Bundaŝ-on! Povra ŝi pensis, ke neniu el ili ŝi revidos. Ŝi aŭdis, ke majstron Mrkonja prirabis en la arbaro maliculoj kaj ŝi pensis, ke li estas morta.

Tial ŝi havis grandan, nigran tukon surkape kaj estis ploranta.

Nun ĉiuj revenis al ŝi kaj alkondukis ankoraŭ unu malgrandan, belegan knabinton, kiun la majstrino rigardis per tiom milda rigardo, ke en la koro de Gita estis ĉiam pli kaj pli varme, kvazaŭ atendus ŝin granda feliĉo.

Tiam ili ĉiuj eniris la laborejon - kaj ni lasu ilin iom solaj, ke ili elkore povu saluti unuj la aliajn, brakumi kaj refortiĝi pro malsato kaj vojaĝo.

MARICA

Iom pli poste sidis ĉe la tablo en la ĉambro majstro Mrkonja, la majstrino, Hlapiĉ kaj Gita.

Dum la manĝo ili ripozis - sidis kun trankvilaj kaj feliĉegaj vizaĝoj.

La majstrino per malgaja kaj milda rigardo rigardis Gitan.

Finfine diris la majstrino al la majstro:

"Tiel granda kiel Gita nun estus nia Marica."

Tiam eksopiris ankaŭ la majstro kaj li diris al Hlapiĉ:

"Mi promesis, ke mi rakontos al vi, kia malfeliĉo okazis al ni foje dum foiro. Aŭskultu, kio estis. Antaŭ ok jaroj ni loĝis en alia urbo. Ni havis malgrandan, belan filinon, kiu nomiĝis Marica. Ŝi estis trijara - kaj ŝi estis nia tuta feliĉo. Iun tagon estis en la urbo foiro. Mi foriris kun la varoj al la foiro kaj mi kunprenis nian etan Marica. Dum mi vendadis la varojn, perdiĝis la infano subite inter homoj en la foiro. Ni serĉis kaj serĉadis - sed la infano malaperis. Ni serĉadis tiun tutan tagon kaj postajn ok tagojn - kaj unu monaton kaj unu jaron - sed neniam plu ni trovis nian etan Marica. Estis en tiu foiro ĉiaspecaj homoj. Dio scias, kiuj maliculoj forkondukis nian infanon kaj Dio scias, kiom ŝi suferis - kaj ankaŭ ni! Ĉar kion la gepatroj pensas pri la infana sufero, tion ili ankaŭ mem sentas. - Finfine ni elloĝiĝis el tiu urbo, kie atingis nin tia malfeliĉo. Kaj de tiu tempo, eta mia Hlapiĉ, malboniĝis mia koro kaj vi pro tio multe suferis. - Sed nun estos pli bone, ĉar se ne estintus via boneco, neniam Grga pliboniĝintus kaj helpus al mi liberiĝi."

Tio, ke majstro Mrkonja laŭdis Hlapiĉ-on, estis por Hlapiĉ tiom stranga, ke li ne sciis kien rigardi. Pro honto li ekskrapis sin malantaŭ la oreloj, kliniĝis kaj viŝis la botetojn per sia ruĝa

maniko.

Finfine demandis Hlapiĉ embarasite:

"Kaj nun vi kompreneble povus nek trovi nek rekoni vian etan Marica?"

"Ni neniam trovos ŝin!", sopiris la majstrino kaj forviŝis larmon el la okulo. "Sed rekoni ni ĉiam povus ŝin."

"Kiel vi rekonus ŝin, se ŝi tiam estis tiom malgranda?", demandis Gita, kiu mem preskaŭ ekploris pri la malfeliĉo de la bona majstrino.

"Ni rekonus ŝin", respondis la majstrino "ĉar, kiam Marica estis tute malgranda, ŝi kaptis tranĉilon kaj tranĉis sian dikfingron. De tiu tempo ŝi havis cikatron sur la dikfingro, kiu aspektis kiel kruco."

Ho Dio, Dio! Ĉu iu vidis, kiel ĉirkaŭbrakas sin patrino kaj infano, post kiam ili retrovis unu la alian post multaj jaroj?

Kompreneble, ke Gita estis tiu eta Marica - kaj ŝi havis la cikatron sur la dikfingro.

"Ho, panjo! Patrino mia! Bona mia! Kara mia! Mi estas via Marica!", ekkriis Gita kaj ŝi kuris en la brakojn de la majstrino.

"Marica mia! Koro mia!", ekĝemis pro feliĉo la majstrino kaj alpremis sian infanon al la sino.

Dufoje kaj trifoje kaj dekfoje ili ĉirkaŭbrakis sin. En la ĉambro aŭdeblis nenio krom ĝoja ĝemado.

Majstro Mrkonja alpaŝis al Gita, lokis sian manon sur ŝian belan kapeton kaj pro feliĉo ne kapablis elvoĉi ununuran vorton. Ŝajnis kvazaŭ la tuta ĉambreto estus lumigita per ora lumo el pura feliĉo.

Kaj al eta, bona Hlapiĉ ŝajnis, ke li estas en preĝejo. Li staris tute trankvila, li subenigis la rigardon kaj kunmetis la manojn, ĉar li ekhavis la bezonon fari tion.

Longe ili sidadis post tio, longe ili interparolis kaj Gita el la patrino sino translokiĝis sur la patrajn genuojn kaj ĉiam pli bela ŝajnis al ili Gita kaj ĉiam pli bonaj ŝajnis al Gita ŝiaj gepatroj.

La gepatroj nun kompreneble nomis ŝin "Marica". Sed ni nomos ŝin ĝis la fino de tiu ĉi libro Gita, ĉar malfacilas alkiutimiĝi al nova nomo.

Hlapiĉ diris:

"Mi plu nomos vin "Gita". Kiam mi diras "Gita", ŝajnas al mi revidi ĉiujn aventurojn, kiujn ni kune travivis. Kiam mi diras "Marica", mi vidas nenion. Kvazaŭ mi estus dirinta nenion!"

"Sufiĉis da aventuroj, eta mia Hlapiĉ", diris la majstro. "Ni neniam ekscios, kiu en la foiro forkondukis nian Marica kaj vendis ŝin al la cirkomastro. Sed povus esti, ke tio estis la nigra homo, kiu min prirabis kaj kiu laŭ via rakonto kondukis la ŝtelitan ĉevalon en la cirkon. Kaj sen vi, kara mia Hlapiĉ, neniam Marica revenus al ni."

"Ne laŭdu min", diris Hlapiĉ. "Se vi ne estintus tiom severa kun mi, mi neniam forlasintus vin kaj ne trovus Gita-n. Eble tio estas via merito. Tion oni neniam scias."

Hlapiĉ pravis dirinte tion. Kiam oni laŭdas alian homon, oni neniam scias, ĉu oni pravas. Tial estas plej saĝe, ke ambaŭ danku al Dio.

Tion ili ankaŭ faris.

La postan tagon matene aĉetis la majstro kaj la majstrino unue novajn vestaĵojn por Hlapiĉ kaj Gita kaj poste ili ĉiuj bele vestiĝis kaj foriris en la preĝejon. Kiam ili eniris la preĝejon, ekbrilis tra ĉiuj preĝejaj fenestroj gaja suno - kaj tiel ili vidis, ke nun ili pravas kaj ke Dio mem ĝojas pri la feliĉo, kiun li donis al ili.

HEREDAĴO DE HLAPIĈ

Kiam ili revenis el la preĝejo, diris Hlapiĉ:

"Mi havas ankoraŭ laboron ekstere. Majstro, mi petas, ke vi permesu al mi foriri dum duona horo."

La majstro permesis al li tion, ĉar nun ĉio estis alia ol antaŭe.

Hlapiĉ prenis bukedon da ruĝaj papavoj kaj blankaj lekantoj kaj diris: "Tion mi promesis al iu."

Nun ĉiuj povas kompreni, kiel saĝa kaj justa estis Hlapiĉ. Dum ĉiuj danĝeroj kaj embarasoj survoje li ne forgesis, ke li promesis alporti florojn al tiu servistino, se ŝi helpas al la maljuna laktoportisto porti lakton sur la ŝtuparo.

Hlapiĉ iris tra la urbo kaj portis sian florbukedon al la servistino. Li tuj trovis kaj rekonis tiun altan domon. Li grimpis al la tria etaĝo kaj sonoris ĉe la pordo.

La servistino malfermis la pordon kaj ekmiregis, kiam ŝi vidis tiun iam buntan Hlapiĉ nun en tiom belaj vestaĵoj. Sed tamen ŝi tuj rekonis lin, ĉar homoj ne rekonas unuj la aliajn laŭ vestaĵoj sed laŭ okuloj.

"Fraŭlino, mi alportis al vi la promesitajn florojn", diris Hlapiĉ kaj etendis la bukedon el papavoj kaj lekantoj.

"Ho, kiel justa vi estas, etulo!", diris la servistino "kaj kiel feliĉa vi estas. Por vi troviĝas letero ĉi tie. Se vi ne alvenus kun la floroj, vi neniam ricevus ĝin."

Hlapiĉ travivis multon dum sia vojaĝo sed ankoraŭ neniam en sia tuta vivo li ricevis leteron.

Tial li konsterniĝis, kiam la servistino eniris en sian ĉambron, alportis grandan leteron kaj transdonis ĝin al Hlapiĉ dirante:

"Tiun ĉi leteron alportis iu knabo. Li diris, ke la maljuna laktoportisto mortis pro maljuneco. Kaj tiun ĉi leteron li skribigis antaŭ la morto. Se la metilernanto Hlapiĉ venos al mi kun floroj, mi transdonu al li tiun ĉi leteron", diris la knabo. Tiel rakontis la servistino, Hlapiĉ staris enpensiĝinta kaj premis la leteron en la manoj. Li ne vere sciis, kion li faru per la letero kaj li eĉ pripensis, ĉu li donacu ĝin al la servistino kune kun la floroj. "Sed tio tamen estus sensenca", li pensis "ĉar sur la letero estas skribita la adresato metilernanto Hlapiĉ kaj tio estas nur mi en la tuta mondo." Do Hlapiĉ decidis kaj rapide ŝirmalfermis la leteron. Tio estis tre saĝa decido. Se vi timus iun leteron, faru la samon, ĉar ĉiu letero estas ankoraŭ pli terura, dum ĝi estas fermita kaj dum oni ne scias, kio en ĝi troviĝas. Sed tiu ĉi estis vere ĝojiga letero! En ĝi per grandaj literoj estis skribita la jeno:

Mortis la maljuna laktisto sen infanoj kaj sen parencoj. En la mortolito li memoris la metilernanton Hlapiĉ kaj heredigis al li sian ĉaron kaj azenon. Tion oni sciigas al la metilernanto Hlapiĉ kun la peto, ke li venu preni sian heredaĵon en la eksloĝejo de la maljunulo apud la urba murego.

Supre kaj sube sur la letero estis ankoraŭ io skribita per literoj kaj ciferoj. Tio verŝajne estis superskribo kaj subskribo. Sed tion Hlapiĉ tralegis nek nun nek poste. Kiam li aŭdis, ke li heredis la ĉaron kaj la azenon, li ne plu zorgis pri tio, kiu sciigas tion al li.

Lia koro nun estis dankoplena.

"Ho, kiom bona estis tiu maljunulo! Kiom volonte mi dankus al li!", ekkriis Hlapiĉ. "Se li nur povus vidi, kiel Gita kaj mi kombos kaj atentos lian azenon!"

"Adiaŭ! Adiaŭ! Fraŭlino. Mi rapidas mesaĝi al Gita tiun ĉi ĝojan novaĵon."

Hlapiĉ volis ekkuri al la ŝtuparo.

Sed tiam el la ĉambro eliris maljuna kaj eleganta sinjorino, kiun servis la servistino. La sinjorino surhavis nigran, silkan robon kaj blankan ĉapeton surkape.

Ŝi aŭdis de sia servistino, kiel bona kaj nekutima estas tiu ĉi metilernanto Hlapiĉ.

Kompreneblas, ke ŝi nun ofertis akcepti lin kiel sian filon kaj ebligi al li lerni en nobelaj lernejoj.

Sed Hlapiĉ formetis sian ĉapon, alpaŝis al la sinjorino, kisis ŝian manon kaj diris:

"Mi restos ŝufaristo, ĉar mi plej ŝatas tiun metion."

Kaj ankoraŭ li diris:

"Ĉiukaze ekzistas pli da homoj kiuj difektas ŝuojn ol tiuj, kiuj ilin faras."

La eleganta sinjorino ekridis kaj komprenis, ke estus vera domaĝo por Hlapiĉ, se li ne iĝus ŝufaristo. Hlapiĉ kisis ankoraŭ foje ŝian manon kaj ekkuris feliĉe kun sia letero malsupren laŭ la ŝtuparo.

Efektive Hlapiĉ ŝatis sian ŝufaristan metion, sed ĉimomente li pli pensis pri sia azeno, por kiu ĉe la eleganta sinjorino neniel estus loko.

Hlapiĉ rapidis laŭ la urbaj stratoj kaj baldaŭ hejmenvenis.

"Ni veturigos ŝuojn per azeno!", li ekkriis jam de la pordo al majstro Mrkonja, montris sian leteron kaj rakontis al ĉiuj, kio okazis.

La saman tagon posttagmeze iris Gita kaj Hlapiĉ transpreni la azenon kaj la ĉaron.

Kompreneble ke ili malfacile trovas la dometon de la maljunulo, sed en la letero estis skribite, ke la maljunulo loĝis apud la urba murego. Kaj la murego estas alta kaj tiom elstaras, ke ĝi estas tre facile trovebla.

Kiam Hlapiĉ montris sian leteron, la homoj, kiuj antaŭe loĝis kun la maljunulo transdonis la azenon kaj la ĉaron.

Vere indus vidi, kiel Hlapiĉ kaj Gita nun veturis en la urbon sur la ĉaro de Hlapiĉ!

Tio estis tiom bela kaj gaja, ke Gita bedaŭris, ke ŝi nun ne havas sian oran trumpeton por trumpeti per ĝi. Rimarkeblis ankorau, ke ŝi edukiĝis en cirko!

Sed Hlapiĉ rediris, ke por la filino de majstro Mrkonja ne konvenus trumpeti tra la urbo rajdante azenon.

Tial ili nur mallaŭte kaj ĝoje kantis dum la tuta vojo kaj aerbatis per vipo super la saĝa azeno, kiu movis siajn longajn orelojn.

Sed antaŭ la domo de majstro Mrkonja Hlapiĉ ne povis reteni sian ĝojon ĵetinte sian ĉapon alten en aeron. Li kuris al la enirpordo kaj ŝovis la kapon en la domon. Plenvoĉe li ekkriis:

"Jen azeno!"

"Ha, kion vi diris!", ridis Gita kaj esprimokis Hlapiĉ-on.

Kompreneble, ke ĉiuj homoj sciis, ke Hlapiĉ ne pensis pri si, kiam li enŝovis la kapon tra la pordo kaj diris: "Jen azeno!" - sed la friponino Gita tamen primokis lin kaj ili ambaŭ ridis.

Ke ne plu estu miskomprenoj ili tuj baptis la azenon kaj nomis ĝin "Kokodan".

Tie staris iu virino kaj vidinte, kiel belege alveturis Hlapiĉ kaj Gita sur la ĉaro kaj kiel gajaj kaj feliĉaj ili estas, ŝi diris:

Dio mia, kiel bele estus, se infanoj ĉiam restus tiel malgrandaj!"

"Tiukaze ni devus dum nia tuta vivo frekventi la saman klason", diris Hlapiĉ.

"Sed tion ne permesus instruistoj kaj ekestus problemoj. Pro tio estas plej bone, ke ni nun ludu kaj poste ni adoleskiĝos kiel aliaj homoj."

LA FINO

Tiel ja ankaŭ estis.

Hlapiĉ kaj Gita adoleskiĝis. Hlapiĉ restis ŝufaristo kaj Gita tute forgesis, ke ŝi iam estis en cirko. Nur unufoje okazis io, kio ŝin rememorigis pri tio.

Post kelkaj jaroj venis en la urbon iu cirko kaj majstro Mrkonja iris dimanĉon kun sia familio en la cirkon.

Tie Gita subite vidis, ke en la arenon eniris iu belega, malgranda knabino sur blanka ĉevalo. Tio estis "Soko" de Gita. La knabino estis same tiel malgranda kaj bela kiel iame estis Gita. Kaj Soko estis same tiel bona kaj aminda kiel antaŭe. Liaj haroj nur iom griziĝis kaj li estis ankoraŭ pli hela, ĉar ankaŭ ĉevaloj grizhariĝas, kvankam ili ne havas zorgojn kiel homoj. Gita vidis ankaŭ sian papagon - kaj ŝi eksciis, ke ĝi kaj Soko tre bonfartas ĉe nova mastro.

La malnova mastro nome baldaŭ post la fuĝo de Gita malsaniĝis - kaj tiam li konfesis siajn pekojn kaj trankvile mortis, kio por tia pekulo estas la plej bona sorto.

* * *

Poste Gita kaj Hlapiĉ plenkreskis kaj geedziĝis. Poste ili transprenis la laboron de majstro Mrkonja, kiu jam tre maljuniĝis.

Gita kaj Hlapiĉ havis kvar infanojn kaj tri metilernantojn.

Dimanĉe posttagmeze ĉirkaŭis ilin la infanoj kaj metilernantoj kaj li rakontis "la mirindajn aventurojn de la metilernanto Hlapiĉ".

La botetoj staris ankaŭ tiam kaj ĉiam poste en malgranda

vitra ŝranketo sur la granda ŝranko kaj ĉiu, kiu deziris, povis ilin vidi.

Se iu bedaŭras, ke la rakonto jam estas finita, tiu trafoliumu ankoraŭ foje la tutan libron kaj provu nombri al kiom da personoj helpis survoje la metilernanto Hlapiĉ, eta kiel kubuto, ĝoja kiel birdo, kuraĝa kiel la reĝido Marko, saĝa kiel libro kaj bona kiel la suno.

ENHAVO

| | |
|---|-----------|
| AL ETAJ LEGANTOJ | 5 |
| ĈE MAJSTRO MRKONJA | 6 |
| METILERNANTO HLAPIĈ | 6 |
| BOTETOJ | 7 |
| FUĜO | 9 |
| LA UNUA VOJAĜTAGO | 12 |
| ETA LAKTISTO | 12 |
| GRANDA KAPO MONTRIĜAS TRA LA HERBOJ | 16 |
| DOMO KUN BLUA STELO | 17 |
| LA DUA VOJAĜTAGO | 22 |
| HLAPIĈ KAJ ŜTONHAKISTOJ | 22 |
| NIGRA HOMO | 24 |
| LA TRIA VOJAĜTAGO | 27 |
| GRANDA MALĜOJO | 27 |
| KNABINO SUR LA VOJO | 28 |
| SUR FOJNOHERBEJO | 30 |
| PREZENTAĴO | 33 |
| INTERPAROLO DE HLAPIĈ KAJ LA LABORISTOJ | 36 |
| LA KVARA VOJAĜTAGO | 38 |
| INCENDIO EN LA VILAĜO | 38 |
| GRANDA MIRAKLO | 41 |
| LA PATRINO DE GRGA | 42 |
| CIKATRO DE GITA | 43 |
| LA KVINA VOJAĜTAGO | 46 |
| LA PAŜTADO | 46 |
| KIEL APERIS HOMO APUD HLAPIĈ | 51 |
| GRGA KAJ HLAPIĈ | 55 |
| NOKTO MALANTAŬ LA FORNO | 57 |

| | |
|-------------------------------------|------------|
| LA SESA VOJAĜTAGO | 60 |
| ETA ŜUFARISTO KAJ ALMOZULINO JANA | 60 |
| EN LA FOIRO | 61 |
| DU KORBOPLEKTISTOJ | 63 |
| SUR LA KARUSELO | 67 |
| SEN TEGMENTO | 70 |
| LA SEPA VOJAĜNOKTO DE HLAPIĈ | 73 |
| KONATA VOĈO | 73 |
| NOKTE EN LA CIRKO | 74 |
| NOVA DANĜERO | 76 |
| DU MALICAJ HOMOJ | 77 |
| HLAPIĈ DECIDAS | 79 |
| NOKTA VOJAĜO | 80 |
| ĈARO EN NEBULO | 83 |
| LA HELPO | 84 |
| HLAPIĈ KAJ GITA REE SOLAJ | 86 |
| EN LA DENSEJO KAJ MALLUMO | 87 |
| LA TERURO | 90 |
| LA SURPRIZO | 90 |
| KIEL TIO OKAZIS? | 91 |
| ĈE LA DOMO DE MARKO | 94 |
| EPILOGO | 97 |
| FELIĈO KAJ ĜOJO | 97 |
| MARICA | 98 |
| HEREDAĴO DE HLAPIĈ | 101 |
| LA FINO | 105 |

Kroata Esperanto-Ligo
Zagreb, Amruševa 5/1
HR - 10000 Zagreb

Respondecas D-ro Dalibor Brozović

ISBN 953-96918-2-6

La libro estas presita per la helpo de Kroata Kulturministerio.